

# SCIENCA REVUO

Aperas 6-foje jare. Jarabono 56 steloj, 14 ned. gld., 5,50 us.dol., 100 jug. din.

## ENHAVO:

A. Holzhaus: L. Zamenhof kaj cara cenzuro  
V. Peevski: La fotogrametrio kaj ĝia aplikado  
R. L. Harry: Evoluo de la internacia juro pri la maro  
Novaĵoj: sciencaj, teknikaj  
Enhavtabelo de Vol. 25

## L. ZAMENHOF KAJ CARA CENZIURO

(ADOLF HOLZHAUS, COLUMBUS, USONO)\*/

En Rusujo ĉiam estis cenzuro. La rusa fablisto Ivan Andrejeviĉ Krilov (13. de Februaro 1768. - 21. de Novembro 1844.) eldonadis satirajn ĵurnalojn: en la 1789. "Spiritan Poŝton", en la 1792. "Rigardanton" kaj en la 1793. "Sankt Peterburgan Merkurion". Unu post alia la ĵurnaloj estis malpermesitaj de la cenzuro. En la 1790. la verkisto Aleksandr Nikolajeviĉ Radiŝĉev (20. de Aŭgusto 1749. - 13. de Septembro 1802.) pro la libro "Vojaĝo el Peterburgo Moskvon" estis kondamnita al morto, kiu estis anstataŭigita per ekzilo en Siberion.

Post la morto de la carino Jekaterino la Dua la 17-an de Novembro 1796. Paŭlo la Unua fariĝis caro (17. de Novembro 1796. - 23. de Marto 1801. mortigita); li proklamis severajn dekretojn (ruse ukaz) pri la cenzuro kaj malpermesis la importon de libroj. La konservativa verkisto kaj historiisto Nikolaj Miĥajloviĉ Karamzin (12. de Decembro 1766. - 3. de Julio 1826.) post la 1796. plendis, ke la cenzuro kiel "nigra urso" kuŝas sur vojoj de la literaturo.

Caro Aleksandro la Unua (24. de Marto 1801. - 1. de Decembro 1825.) en la 1804. proklamis dekreton pri la cenzuro. En la Ministerio, de la popola klerigado estis koncentrita "Administracio por presaferoj", sen kiu permeso neniu libro povis esti presata.

En la 1824. la poeto, princo Pjotr Andrejeviĉ Vjazemskij (23. de Julio 1792. - 22. de Novembro 1878.), preparis eldonon de poemo "Baĥĉisaraj'a fontano" de Aleksandr Sergejeviĉ Puŝkin (6. de Junio 1799. - 10. de Februaro 1837. mortpafita). Por publikigo Puŝkin elfetis el la poemo ĉion, kion la cenzuro povus elfeti, kaj skribis al Vjazemskij: "... sdelaj milostj, ne ustupaj ĉtoj suke cenzure, otgrizivajsja za kaŝdij stiĥ, i zagrizi jeje, jesli vozmofno, v moje vospominanije" (Vi havu bonecon, ne cedu al tiu hundino-cenzuro, remordu por ĉiu verso, kaj mordu ĝin, se estas eble, en mia rememoro).

\*/ 2748 Orchard Lane, COLUMBUS, Indiana, Usono 47201

Pro la ribelo de dekabristoj la 26-an de Decembro 1825. caro Nikolao la Unua (24. de Decembro 1825. - 2. de Marto 1855.) la 10/22-an de Junio 1826. proklamis novan dekreton pri la cenzuro, pli reakcian ol la antaŭa. Laŭ tiu ĉi dekreto oni povis ĉion malpermesi. Ĝi etendis sian zorgon eĉ sur la rusan gramatikon. Kun tiu dekreto restis nekontentaj eĉ altaj klasoj de la socio. La Nova cara dekreto de la 1828. liberigis cenzuristojn de pedagogiaj devoj. La 8-an de Marto 1860. estis publikigita cirkulero, kiu malpermesis presi: a) verkojn kaj karikaturojn, en kiuj oni ekscitas unu socian klason kontraŭ alia, b) artikolojn, en kiuj oni ridindigas civilajn kaj militistajn ŝtatoficistojn, c) informojn pri moraleco kaj privata vivo de homoj de diversaj rangoj. En la 1863. cenzurajn aferojn transprenis la Ministerio de la internaj aferoj. Caro Aleksandro la Dua (2. de Marto 1855.-13. de Marto 1881., murdita per bombo de la polo Ignacij Griniewecki (1856.-1881.)), la 6-an de Aprilo 1865. proklamis novan dekreton, enkondukantan anticipan kaj punan cenzurojn. De anticipa cenzuro estis liberigitaj originalaj verkoj, ampleksantaj pli ol 10 presitajn foliojn, tradukaj verkoj, ampleksantaj pli ol 20 presitajn foliojn. De periodaj publikaĵoj, elirantaj sen la anticipa cenzuro, estis postulata mona garantiaĵo.

Pro la revolucio la 24-an de Novembro 1905. estis publikigitaj provizoraj reguloj, kiuj liberigis presafereojn de la anticipa cenzuro kaj de administraj punoj, sed konservis juĝajn persekutojn.

Pri la revolucio de la 1905. (tiam regis la lasta rusa caro Nikolao la Dua; 1. de Novembro 1894.-17. de Julio 1918. mortpafita) poeto Vladimir Vladimiroviĉ Majakovskij (19. de Julio 1894.-14. de Aprilo 1930.) verkis versafon:

Carj ispagalsja, izdal manifest:

Mertvim svobodu, ŝivifi pod arest.

(Traduko: la caro ektimis, proklamis manifeston: al mortintoj liberon, vivantojn en malliberejon). (BG, 5075; BJ, 948-962; BS, 518).

Neniu libro, neniu gazeto, neniu folieto povis esti presata sen permeso de la cenzuro. La cenzuristo subskribas manuskripton kaj sen lia subskribo neniam presejo sub severa respondeco povas komenci la presadon. La cenzura permeso ĉiam devis esti presata en ĉiu libro. La tago de apero de presita libro estas pli malfrua. Estas necesa ankoraŭ nova permeso de cenzuro por publikigi la jam presitan libron, tiel nomata "Biletulo por ellasi" ĝin. Nur tiam la libro povas aperi en librovendejoj. (ZH, 10; EE 2, 550).

## LA UNUAJ JAROJ DE LA MOVADO

Zamenhof en la komenco de Januaro 1885. finis la Varsovian universitaton (diplomon li ricevis la 28-an de Februaro (la 12-an de Marto laŭ la nova kalendarstilo), komencis pensi pri publika eliro kun sia laboro kaj serĉi eldoniston por sia manuskripto: "Dr. Esperanto. Meŝdunarodnij jazik. Predisloviĵe i polnij uĉebnik por Rusoj. Ĉtobi jazik bil vsemirnim, ne dostatoĉno nazvatj jego takovim". (Traduko: Dro Esperanto. Internacia lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro por Rusoj. Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia). Dum du jaroj li vane serĉis eldoniston. Eldonistoj neniel volis preni sur sin eldonon de lia verko: "Jam ekzistas ja Volapük", ili diris (1). Kiam li trovis unu,

tiu dum duonjaro pretigis broŝuron por eldono kaj fine - rifuzis. En la 1887. Zamenhof, ricevinte subtenon de sia estonta bopatro, A. Zilbernik, mem entreprenis eldonon de sia manuskripto. Cenzuristo A. Lagodovski, ruso, amiko de la patro de L. Zamenhof (tiam Marko Zamenhof ankaŭ estis cenzuristo por hebreaĵ, judlingvaj presaferoj), dum du monatoj tenis manuskripton (PV, 50) kaj, konsiderante ĝin nedanĝera sensencaĵo, la 21-an de Majo (la 2-an de Junio laŭ la nova kalendarstilo) 1887. metis stampon sur manuskripton: "Dozvoleno cenzuroju. Varŝava 21. maja 1887. goda". (traduko: Permesite de cenzuro. Varsovio la 21-an de Majo de la jaro 1887.). (IL, 2-a paĝo de kovrilo). Nun la presisto Ĥ. Kelter povis komenci presadon de la libro. La 14-an (la 26-an laŭ la nova kalendarstilo) de Julio 1887. cenzuristo donis permeson "ellasi la libron". Pri "ellaso" Zamenhof skribas al Vladimir Majnov (2) en siaj leteroj de la 29-a de Julio 1889.: "La vortaron svedan la cenzuro ne subskribis ankoraŭ "por ellasi en la mondon", de la 7/19-a de Septembro 1889.: "La sveda vortaro jam longe estas preta, sed mi ĝis nun ankoraŭ ne havis permeson ĝin ellasi en la mondon." (OV, 482, 483).

Post ricevo de la cenzura permeso por la rusa manuskripto (2-a de Junio 1887.) Zamenhof komencis traduki ĝin en la polan, francan kaj germanan lingvojn. Tekstoj de tiuj ĉi kvar libroj estas senriproĉaj. La pola manuskripto "Dr. Esperanto. Język międzynarodowy. Przedmowa i podręcznik kompletny por Poloj. Aby język stal się powszechnym, nie wystarczy nazwać go takim" - ricevis la cenzuran permeson la 9/21-an de Julio kaj aperis la 25-an de Aŭgusto (la 6-an de Septembro laŭ la nova kalendarstilo) 1887.; la franca manuskripto "Dr. Esperanto. Langue internationale. Préface et manuel complet por Francoj. Pour qu'une langue soit universelle - il ne suffit pas de lui en donner le nom" estis cenzurita la 12/24-an de Septembro kaj aperis la 12/24-an de Novembro 1887.; la germana manuskripto "Dr. Esperanto. Internationale Sprache. Vorrede und vollständiges Lehrbuch por Germanoj. Damit eine Sprache zur Weltsprache werde, genügt es nicht sie so zu benennen" estis cenzurita la 21-an de Oktobro (la 2-an de Novembro laŭ la nova kalendarstilo) kaj aperis la 12/24-an de Novembro 1887.; la angla manuskripto "Dr. Esperanto's International Tongue. Preface and complete method, edited for Englishmen by J. St. por Angloj. Por making a langue international it is not enough to call it" ricevis la cenzuran permeson la 12/24-an de Januaro 1888. kaj aperis la 13-an de Februaro; la "Dua Libro de la lingvo internacia" ricevis la cenzuran permeson la 18-an (la 30-an laŭ la nova kalendarstilo) de Januaro 1888. kaj aperis en la komenco de la 1888.; "Aldono al la Dua Libro de la lingvo internacia" ricevis la cenzuran permeson la 6-an (la 18-an laŭ la nova kalendarstilo) de Junio 1888. kaj aperis en Junio; la rusa traduko de la "Dua Libro de lingvo internacia", farita de L. Zamenhof sub pseŭdonimo N.N., ricevis la cenzuran permeson la 1-an (13-an) de Decembro 1888. kaj aperis en la komenco de la 1889.; cenzurajn permesojn ricevis: "Plena vortaro rusa-esperanta" - la 28-an de Decembro 1888. (la 9-an de Januaro 1899. laŭ la nova kalendarstilo); 2-a eldono de la "Aldono al la Dua Libro..." la 9/21-an de Januaro 1889.; la rusa traduko de la "Aldono al la Dua Libro...", farita de L. Zamenhof sub pseŭdonimo N.N., - la 9-an (21-an) de Januaro 1889.; la vortaro esperanta-germana (meza vortaro internacia-germana) - la 30-an de Januaro (la 11-an de Feb.) 1889. (EE1, 16, 113; OL, 26; OV, 488, 573; PH, 38; ZH, 10).

Rimarko. J. St. = Julian Steinhaus. En la unua Adresaro de esperantistoj, cenzurita la 18-an (la 30-an) de Septembro 1889., aperinta en Januaro 1890., sur

la p. 31 sub n-ro 883 estas enskribita: "Steinhaus, Julian. Warszawa, Dzielna N. 20, miesz. 12. Rusujo".

La cenzuristo Lagodovski mortis kaj en Julio 1889. Varsovia venis alia cenzuristo por Esperantaj presaferoj (OV, 482). Li estis homo malfavoranta Esperanton. Li ankaŭ mortis (OV, 507). En leteroj Zamenhof skribas: de la 25. 5. (6.6). 1891. al Majnov: "Sed en la lasta jaro la provincaj cenzuraj komitatoj tralastas nenion, tuŝantan la lingvon tutmondan kaj postulas, ke ĉio estu sendata al la cenzura komitato en S. Peterburgo"; de la 3. (15). 10. 1891. al la societo "Espero": "La cenzuristo en Riga ne volas ĝin permesi, dirante, ke li ne komprenas la lingvon Esperanto. Nun en la tuta Rusujo nur la S. Peterburga cenzuro permesas niajn verkojn"; de la 11. (23). 5. 1892. al la societo "Espero": "En Varsovia la cenzuro nenion permesas kaj tial ni sendas la manuskripton al Vi kaj petas Vin prezenti ĝin al la cenzuro Peterburga"; de la 5. (17). 10. 1892. al la societo "Espero": "Varsovia cenzuro nenion volas legi, dirante, ke ĉio tuŝanta la lingvon Esperanto povas esti cenzurata en S. Peterburgo". (OV, 487, 499, 501, 506).

Sekve de la 1891. ĉiuj manuskriptoj devis esti sendataj al S. Peterburga cenzurejo. Sole unu cenzuristo troviĝis tiam en la tuta Rusujo: cenzuristo E. Gejpsitz. Li havis pli superan rangon kaj ne timis donadi prespermesojn. Pro tio la libroeldonado ne ĉesis. En "Esperantisto", n-ro 10, Oktobro 1892., sub abonantoj ni trovas E. Gejpsitz, Alexander-Platz, Komitato de la ekstera cenzuro; en n-ro 3 (39), 15. de Marto 1893., sub n-ro 12 de abonantoj ni trovas E. Gejpsitz, komitet inostrannoĵ cenzuri, S. Peterburg (traduko: Komitato de la eksterlanda cenzuro).

Zamenhof alte taksis Gejpsitz kaj lian helpon. La 19.2. (2.3). 1896. pere de societo "Espero" en S. Peterburgo Zamenhof sendis al Gejpsitz dankan leteron kaj kolekton da diversaj libroj kaj poste senpage sendadis la "Bibliotekon". (OV, 513).

En S. Peterburga cenzurejo kelkaj manuskriptoj kuŝis tre longe: la 5-kopeka lernolibro en la 1892. preskaŭ 2 monatojn, la "Ekzercaro" de Majo ĝis Aŭgusto 1893., verkoj n-roj 41, 56 en la 1894. pli ol du monatojn. (OV, 504, 511, 513). En la cenzurejo manuskriptoj eĉ perdiĝis. En la letero de la 8. (20). 7. 1892. al la societo "Espero" en S. Peterburgo Zamenhof skribas: "Estas domaĝo, ke la manuskripto de la 5-kopeka lernolibro perdiĝis kaj la eldono tiel longe prokrastiĝis". (OV, 504).

V. Devjatnin tradukis "Demon'on", orientan rakonton de Lermontov, kaj en la 1894. deziris ĝin publikigi. Pri la ricevo de la cenzura permeso Devjatnin mem rakontas jenon: "Tradukinte ĝin, mi volis ĝin presigi en Vilno, sed la persisto bezonis la permeson de la cenzuro. Do, mi iris al la Vilna cenzuristo, por ke li trarigardu mian manuskripton, kaj donu la permeson. Sed li ne estis tro afabla kaj diris, ke li ne scias, kio, kaj en kia lingvo estas skribita en mia manuskripto. Nun mi petis, ke li donu al mi la rifuzon skribe, kaj ĉi tiun respondon kun la petskribo mi sendis al la Peterburga Centra Cenzura Komitato. Pasis ok monatoj, ĝis mi, post longaj klopodoj de la tieaj esperantistoj, ricevis fine la petitan permeson." ("Literatura Mondo", Junio 1931., p. 118-120).

-Ankaŭ por nova eldono de presita verko estis necese ricevi novan cenzuran permeson. (OV, 506, 508, 512).

Al ĉiu petskribo, transdonata al cenzuristo, oni devis alĝui stampi mar-  
kon de 80 kop. En la letero de la 5.(17).10.1892. al la societo "Espero" Za-  
menhof interalie skribas: "Mi povas nun presi novan eldonon de kelkaj verkoj  
(NNo 8, 10, 11, 14, 27, 41 kaj 56). ... Al ĉiu verko devos esti aldonita la  
stampa marko de 80 kop., kaj tial mi nun sendas por la 7 verkoj - 5 rublojn  
kaj 80 kop. (5 r. 60 kop. por markoj kaj 20 kop. por la poŝta resendo sub ba-  
nderolo)." Tiam unu usona ora dolaro egalas al 1,942 oraj rubloj, al 4,20 oraj  
germanaj markoj, al 5,18 oraj francaj frankoj.

Kiom da energio, laboro, tempo, mono por stampi markoj, por sendado kaj  
resendado (15, 20, 42 kop.) de manuskriptoj, de verkoj perdis Zamenhof (OV,  
487, 499, 501, 503, 506, 508, 509, 511-513 LZ 1, 115; NR 21, 1959, 82).

Por fondi societon ankaŭ estis necese ricevi permeson. La 1.6.1891. Arthur  
Florell fondis societon "Espero" en S.Peterburgo. En Oktobro generalo Gresse-  
permesis kunvenojn de la societo. La 21.9/3.10. en la Granda Hotelo estis unua  
komuna kunveno de la societo "Espero", kiu sendis telegramon al Zamenhof: "Var-  
sovio, Novolipki 21, L. Zamenhof. Unua komuna kunveno de la societo "Espero"  
trinkas sanon del glora aŭtoro. Terentjev, Florell, Leffler, Wahl, Collins, de  
Majnov, Collins, Martinovski, Klohk, Haller, Halle, Bergeman". (EN, 10. de  
Oktobro 1891., 76).

En la letero de la 22.9/4.10.1891. Zamenhof skribas: "Mi ricevis Vian le-  
teron de la 17/IX kaj ankaŭ Vian telegramon, per kiu Vi alportis al mi efeki-  
van ĝojon kaj por kiu mi kore dankas ĉiujn amikojn subskribitajn sub la telegra-  
mo. Mi deziras al Vi ĉian feliĉon kaj la plej bonajn sukcesojn; ni esperu, ke  
la vespero de la unua kunveno de Via societo restos por eterne grava kaj tur-  
na momento en la historio de nia afero". (OV, 498). La 24-an de Marto (la  
5-an de Aprilo laŭ la nova kalendarstilo) 1892. la ministro de la internaj afer-  
roj konfirmis regularon de la societo "Espero" en S.Peterburgo (EN, 6. de Jun-  
io 1892., 82; EN, 5(41), 15.5.1893., 68; EN, 8(44), 15.8.1893., 116; EN,  
9(57), 15.9.1894., 136; EN, 12(60), 15. 12.1894., 181). En la Enciklope-  
dio de Esperanto ni legas: "Solena malferma kunveno okazis la 24-an de Marto  
1892.". (EE 1, 203).

E. Privat eraras dirante, ke la grava societo "Espero" la 15-an de Aprilo  
1892. ricevis oficialan permeson (PH, 45).

La 15-an de Majo estis la unua oficiala komuna solena kunveno, al kiu mul-  
taj personoj ricevis invitojn. Tiun ĉi oficialigitan societon en Rusujo la 3-an (la  
15-an laŭ la nova kalendarstilo) de Majo 1892. je la 1 h 10 m posttagmeze Za-  
menhof salutis per telegramo: "Benitan komencon - kreskantan potencon - en  
floro kaj gloro - deziras el koro - Zamenhof". (ZH, 50; OV, 501). La societo  
respondis per telegramo en Esperanto: "Espero korege dankas por telegramo  
kaj salutas ĝian unuan honoran efektivan membron elektitan hodiaŭ per aklamacio.  
Prezidanto de-Kanaloŝy-Leffler". (EN, 6. de Junio 1892., 92).

## LA UNUA GAZETPROVO

Multaj amikoj en diversaj urboj de Rusujo kaj eksterlando konstante sendis  
al Zamenhof leterojn kun peto komenci eldonadon de gazeto en la internacia lin-  
gvo Esperanto. Jam en la jaro 1887. Zamenhof klopodis en Rusujo eldoni gaze-  
ton, sed lia revo ne povis efektiviĝi. Grandajn nevenkeblajn barojn li renkontis

tiurilate. En la letero de la 5.(17).10.1887. al Vladimir Majnov Zamenhof skribas: "La ĵurnalo komencos eliri kredeble ĉirkaŭ la monato Januaro aŭ Februaro de la jaro 1888., sed certe diri mi ankoraŭ ne povas, ĉar mi ankoraŭ devas nun labori, ke la registaro donu permeson... Kiam la gazeto komencos eliri, mi donos en ĝi respondojn de ĉiuj demandoj de la legantoj; en tiu gazeto estos priparolata ĉio, kio estas necesa por la lingvo internacia". (OV, 475). "Mi ankoraŭ devas nun labori" povas signifi, ke li eluzos rilatojn kun la cenzuro per sia patro, Marko Zamenhof, kiu tiam estis cenzuristo por hebreaj presaferoj. Pri la rezultato de lia laboro nenio estas konata.

Por la fondo de perioda eldono estis necese ricevi specialan permeson de la ministro de internaj aferoj, kiu estis donata al certa eldonisto kaj redaktoro, kun rigore fiksita programo, eliro el kiu ne estis permesita; por ĉiu ŝanĝo de la programo, titolo de gazeto, abonpago, loko de eldono, estis necese ricevi specialan permeson de la ministro.

En la judlingva publikaĵo "Der jidiŝer veker" (La juda vekanto), eldonita en Odeso, Rusujo, en la 1887., sub redakto de M.L.Lilienblum, aperis poemo "A ŝtajn fin harc" (Ŝtono el koro), en kiu per akra satira tono estis envolvi-ta protesto kontraŭ pogromoj (3). Neniu cenzuristo al tiu libro konsentis doni prespermeson, nur M. Zamenhof kuraĝis doni prespermeson, ne supozante, ke troviĝos iu, kiu sekrete lin kalumnios antaŭ la supera cenzurejo. Kaj tamen tio okazis. La afero estis transdonita al Zusmen. Nikolaj Vasiljeviĉ Zusmen estis hebrea cenzuristo ĉe supera cenzurejo en S. Peterburgo, estis kontrolanto super ceteraj hebreaj cenzuristoj en Rusujo. Li estis baptita judo kaj drinkemulo. Pro tiu libro Zusmen faris severajn riproĉojn al M. Zamenhof kaj la 25-an de Septembro 1888. por tri monatoj malpermesis aperon de hebrea gazeto "Hacefira" (traduko: La Matenruĝo), redaktata de Naŝum Sokolov kaj cenzurata de M. Zamenhof. Tiu ĉi cenzura decido estis arbitra, sen ia leĝa bazo: M. Zamenhof ne estis eldonisto de hebrea gazeto "Hacefira".

En "Hacefira" estis aparta rubriko "Sciaĵoj el la mondo kaj naturo", kiu prezentis popularajn natursciencajn artikolojn, verkitajn de D-ro J. Frenkel. La 25-an de Septembro 1888. aperis artikolo pri vino. Frenkel priskribis diversajn specojn: blankan vinon, ruĝan, dolĉan, ĉampanan, specon kun enhavo de 8%, de 17% da alkoholo k.t.p. Li opiniis, ke vino en malgranda kvanto havas sanigan efikon, en grandaj kvantoj - malsanigan: li konsilis al legantoj neniam trinki pli ol kvaronlitron da vino ĉiutage. Artikolon li finis per averto:

"Pli ol tiu kvanto difektas kaj malsanigas. Prave ni diru: Morto kaj vivo dependas de la alkoholo. Troaĵo aperigas diversajn malsanojn. Daŭra trinkado de vino forigas de la cerbo de la homo iom post iom la intelektajn kaj civilizajn kapablojn, kaj kelkfoje ĝi kaŭzas ĉe li frenezecon kaj pardon de la tuta prudento".

Altranga cenzuristo Zusmen estis drinkemulo, ĉiam ebria. Li sciis, kian kutimon kaj kian guston havas la caro. Zusmen supozis aludon al la caro. Estas do nenia surprizo, ke la artikolo vekis ĉe Zusmen flaman koleron kontraŭ Zamenhof. Li akuzis la lojalan cenzuriston M. Zamenhof, ke la lasta per fino de tiu artikolo ofendis la caron. Kion ni hodiaŭ pensu, se tiu ordinara higiena averto estis "ofendo de caro"? Strangaj motivoj kaŝiĝis malantaŭ tiu ĉi sensencaĵo. En tiu momento li sukcesis forpuŝi M. Zamenhofon de lia cenzurista poste-

no. Tio okazis la 12-an de Decembro 1888. (NR 22, 1959, 131, 132, 133, 135, 136).

La baptopatro de Zusmen estis grafo Delanov, ministro de la popola klerigado. Zusmen havis potencon pere de sia baptopatro forigi M.Zamenhofon ankaŭ de lia instruista posteno. Minacis al Zamenhof granda danĝero. Por savi sian patron L.Zamenhof donis al li 5000 rublojn el 10000 rubloj, ricevitaj kiel doto de sia bopatro A.Zilbernik. Aliajn 5000 rublojn L.Zamenhof enmetis en sian "sanktan aferon" kaj por vivteni sin kaj sian edzinon. M.Zamenhof riceviton monon verŝajne donis al Zusmen kaj parte al kelkaj pli altaj oficistoj. La mono savis situacion de M.Zamenhof, sed L.Zamenhof ruiniĝis por ĉiam.

Post la incidento de la patro en Septembro 1888. Zamenhof komprenis, ke liaj rilatoj kun la cenzuro ne plu valoras, ke li devas rapide agi.

La 12-an (la 24-an laŭ la nova kalendarstilo) de Septembro 1888. Zamenhof sendis al Glavnoje Upravlenije po delam pečati (traduko: Ĉefa Administracio por presaferoj) en S. Peterburgo petskribon, ke oni permesu al li eldonadi en la internacia lingvo Esperanto ĉiusemajnan folieton sub titolo "La internaciulo" ("Meždunarodnik"). Al tiu petskribo li aldonis 1) Programon, 2) Klarigon de motivoj, 3) Po unu ekzemplero de eldonitaj de li verkoj de la internacia lingvo, 4) Kopion de la kuracista diplomo. Al la petskribo estas algluitaj 6 stampaj markoj por 1 rub. 60 kop. (80 kop. por la petskribo kaj 80 kop. por la respondo).

La reakcia cara registaro tute ne deziris favori iujn internaciajn ideojn. La Ĉefa Administracio preparis raporton kaj la 28-an de Septembro (la 10-an de Oktobro laŭ la nova kalendarstilo) prezentis ĝin al la ministro de internaj aferoj kun sia propono, rifuzi la petskribon. Motivo estis: "Pro tio, ke en la cenzura oficejo ne estas homo, kiu povas trarigardi eldonaĵojn en novaj inventataj lingvoj". Efektive en Varsovio estis cenzuristo A.Lagodovski, kiu legis kaj donis prespermeson eldoni la Duan Libron (en Esperanto), Aldonon al la Dua Libro (en Esperanto). Same en Varsovio estis Marko Zamenhof, kiu cenzuradis judlingvajn presaĵojn kaj gazeton "Hacefira" en la hebrea lingvo. Sekve ne la Ĉefa Administracio en S.Peterburgo cenzuradis gazetojn, sed lokaj cenzuristoj. La Ĉefa Administracio por presaferoj povis devigi kelkajn cenzuristojn ellerni tre facilan Esperanto-lingvon kaj havi necesajn cenzuristojn. Kial ĝi tion ne faris? Sur raporto la subministro de internaj aferoj surskribis nur unu vorton: "Soglasen" (traduko: mi konsentas), metis sian subskribon Pleva kaj daton 30. IX.1888. Laŭ la nova kalendarstilo tio estas la 12-a de Oktobro 1888. [Vjače-slav Konstantinoviĉ Pleva (20. de Aprilo 1846. - 28. de Julio 1904.) de la 1881. estis direktoro de la ŝtatpolica departamento, de la 1884. subministro de internaj aferoj, de la 1902. ministro de internaj aferoj kaj la 28-an de Julio 1904. pro sia reakcia agado estis murdita per bombo en S.Peterburgo de E.S.Sazonov. (ML, 485)]. La Ĉefa Administracio la 3-an (la 15-an laŭ la nova kalendarstilo) de Oktobro per la ĉefa policestro en Varsovio sendis sciigon al Zamenhof pri la rifuzo, sen motivoj. (OV, 479). Mi sukcesis el Leningrad, Sovetujo, ricevi 19 fotokopiojn de la petskribo kun aldonoj: de la programo, klarigo de motivoj, diplomo, raporto, anonco pri rifuzo, kaj mi donas iliajn plenajn tekstojn en Esperanto.

N-ro 56

Arĥiva N-ro

Afero de la Ĉefa Administracio por presaferoj.

Petskribo de s-ro Zamenhof pri permeso al li eldonadi en urbo Varsovio en la internacia (Esperanta) lingvo gazeton sub titolo "La internaciulo" (Meĵdunarodnik).

Komencita la 15-an de Septembro de la jaro 1888.

Finita . . . . . 1888.

Sur 10 folioj.

Al Lia Moŝto, Sinjoro estro de la Ĉefa Administracio por presaferoj.

De loĝanto de la urbo Varsovio,  
kuracisto Lazaro Zamenhof

#### PETSKRIBO.

Mi havas la honoron plej humile peti Vian Moŝton pri permeso al mi eldonadi en la urbo Varsovio ĉiusemajnan folieton en la internacia (Esperanta) lingvo laŭ la aldonita programo.

Mi havas la honoron aldoni:

1. Programon de la intencata, por la eldono, folieto;
2. Klarigon de motivoj, kiuj min instigas peti permeson pri la supre menciita eldonafo;
3. Po unu ekzemplero de la eldonitaj de mi verkoj pri la internacia lingvo;
4. Kopion de mia kuracista diplomo.

Lazaro Zamenhof

Mi loĝas en la urbo Varsovio apud strato Przejazd n-ro 9.

La urbo Varsovio, la 12-an de Septembro 1888.

80 kopekan stampan markon por respondo mi plej respektoplene aldonas.

(Rimarko. Al petskribo estas algluitaj 6 stampaj markoj por 1,60 rub.)

#### PROGRAMO

de la intencata por eldono en la urbo Varsovio en la internacia (Esperanta) lingvo, sub redaktado kaj eldonado de Lazaro Zamenhof, ĉiusemajna folieto sub titolo "La internaciulo" (t.e. "Meĵdunarodnik").

1. La enhavo de gazeto estas supozata jena:
  - a) Beletro, t.e. romanoj, noveloj, dramaj verkoj, poemoj kaj simila.  
(Tiu ĉi fako konsistas plej parte el tradukoj de diversaj klasikaj verkoj).
  - b) Stilistikaj ekzercoj.
  - c) Filologia diskuto pri la internacia lingvo, t.e. klarigo de diversaj diskutataj punktoj, koncernantaj la lingvon, esploro de diversaj proponataj ŝanĝoj kaj perfektigoj en la lingvo kaj simila.
  - ĉ) Informoj pri disvastigado de la internacia lingvo kaj pri rilato de la publiko al ĝi.
  - d) Korespondadoj, koncernantaj la internacian lingvon.
  - e) Respondoj de la redakcio.
  - f) Privataj anoncoj.
2. Gazeto estos eliranta en la urbo Varsovio en la internacia (Esperanta) lingvo, unu fojon semajne, en amplekso de unu presa folio malgrandformata, enhavanta 8 paĝojn.
3. Redaktoro kaj eldonanto de la supozata gazeto estos loĝanto de la urbo Varsovio, kuracisto Lazaro, filo de Marko, Zamenhof.



4. La prezo de la gazeto inkluzive transsendon kaj enmanigon estas supozata ses rublojn por jaro.

-----  
Aldono al la petskribo de Lazaro Zamenhof.

#### KLARIGO DE MOTIVOJ,

instigantaj min peti permeson por eldono de ĉiusemajna folieto en la internacia lingvo.

Scio de fremdaj lingvoj estas en la nuna tempo nepre bezono por ĉiu pli malpli klera homo. Unuflanke, dum viglaj internaciaj rilatoj homo, ne posedanta fremdajn lingvojn, ofte trovas sin en la stato de mutulo; aliflanke, eĉ tiuj personoj, kiuj havas neniujn rilatojn kun eksterlandanoj, nepre devas scii la plej ĉefajn fremdajn lingvojn, se ili ne deziras, ke konstante naskiĝantaj novaj akiraĵoj de la civilizacio restu por ili libro sub sep sigeloj. Necesecon de scio de fremdaj lingvoj nuntempe kontraŭparoli neniu povas; tial en nia patrujo, same kiel ankaŭ en ĉiuj aliaj ŝtatoj, studado de fremdaj lingvoj estas enkondukita en la devigan programon de ĉiuj lernejoj.

Ni rigardu tamen, kion ni en la nuna tempo atingas per studado de fremdaj lingvoj. Devigitaj studadi samtempe kelkajn lingvojn, ni ordinare eĉ unu el ili ne povas ellerni funde, kaj eĉ tiuj nemultaj, kiuj havis eblecon speciale dediĉi al studado de lingvoj tutan vicon da jaroj, finfine scias nur lingvojn de du-tri popoloj, sed la tuta cetera mondo estas por ili kiel antaŭe fermita. Kaj dume kiom da oferoj estis neceso alporti, por atingi tiujn ĉi mizerajn rezultatojn! Estis necese dum la tuta vico da jaroj turmenti junajn kapojn per diversaj malregulaj deklinacioj kaj konjugacioj, per esceptoj kaj per esceptoj el esceptoj, per sennombra multo da fremdaj vortoj kaj esprimoj; estis necese dum la tuta vico da jaroj forŝiri ilin de deca ellerno de la gepatra lingvo.

Ĉio tio ĉi ne estus, kompreneble, se en la vico kun naciaj lingvoj ekzistus iu komuna internacia lingvo por la internaciaj rilatoj. La tuta mondo estus tiam malfermita por ni, kaj la tempon, kiun ni preskaŭ senfrukte perdas por la studado de diversaj lingvoj, oni povus tiam uzi pli produktive, dediĉante ĝin al funda ellerno de la gepatra lingvo kaj al studado de diversaj utilaj sciencoj. Ĉar tiam ni krom la gepatra lingvo devus studadi nur unu fremdan lingvon.

Konsiderante ĉion supre diritan, estas kompreneble, kial la enkonduko de internacia lingvo de la plej antikvaj tempoj apartenas al la plej amataj revoj de la homaro. Estis faritaj diversaj provoj kun la celo enkonduki tiun aŭ alian el la ekzistantaj lingvoj en la ĝeneralan uzon ĉe ĉiuj civilizitaj popoloj. Sed ĉiuj tiuj ĉi provoj finiĝadis per nenio. La sperto montris, ke la estonta internacia lingvo devas esti arte kreita: ĉar unuflanke memamo de popoloj neniam permesos, ke lingvo de iu popolo fariĝu superreganta, kaj aliflanke ĉiu el la ekzistantaj lingvoj, ĉar formiĝinta blinde kaj senkontrolle, estas tre malfacila por studado. Kontraŭe, arta lingvo tuŝos nenies nacian fierecon kaj samtempe povas esti alkondukita ĝis la plej granda reguleco, simpleco kaj facileco por studado. Jam Leibniz venis al tiu konvinko, ke la estonta internacia lingvo devas esti kreita arte; al tiu sama konvinko venis post Leibniz diversaj pensuloj kaj sciencistoj, - kaj en la nuna tempo tiun ĉi konvinkon dividas ĉiuj okupiĝantaj kaj interesiĝantaj je demando pri internacia lingvo.

Tuj kiam stariĝis konvinko, ke la internacia lingvo devas esti kreita arte, komencis aperadi ankaŭ provoj krei tian lingvon. Sed aŭtoroj de tiuj ĉi provoj limigis sin nur per projektoj kaj pluen ili ne iris; nur unu el ili (Ŝlajer) kreis efektive pretan lingvon ("Volapük"). Sed "Volapük", prezentante per si

vere lingvon, havas tamen en si nenion internacian: ĝi estas lingvo arbitre elpensita, al neniu komprenebla kaj de neniu (krom certa nombro da adeptoj) agnoskita. Utilo de tiu ĉi lingvo estas do nur kondiĉa kaj tial eksterordinare dubla: se la mondo akceptos tiun ĉi lingvon, ĝi estos utila, - sed se la mondo ĝin ne akceptos, tiam ĝi nenion signifon havos kaj tute neniun utilon alportos al siaj adeptoj.

Mi unua, ŝajne, sukcesis ellabori lingvon, havantan eblecon fariĝi peranto inter popoloj. Krom siaj, por tiel diri, internaj kvalitoj (kiaj estas, ekzemple, neordinara facileco, natureco, sonoreco, fleksebleco ktp.), - ĝi havas unu eksterordinare gravan kvaliton, kiu en simila afero ludas unuan rolon, nome: ĝia utilo ne estas problema, sed palpebla kaj senkondiĉa. Ĝi ne estas lingvo, kiu "povas fariĝi internacia en okazo, se la mondo ĝin akceptos" - ĝi estas lingvo, per kiu oni povas jam en la nuna tempo facile interkompreniĝi kun ĉiu pli malpli klera eŭropano. Tio ĉi estas tial, ke vortaro de la lingvo ne estas kombinita arbitre, sed kompilita tiel, ke ĉiu vorto estu pli malpli konata al ĉiu pli malpli klera homo. Ĉion, kio estas skribita en la proponita de mi internacia lingvo, ĉiu mezklara homo facile komprenos, eĉ se li havas neniun komprenon pri tiu ĉi lingvo, - li komprenos tion ĉi komence kun ŝlosilo en la mano, kaj post la kvinminuta sperto - jam eĉ sen la ŝlosilo.

Dank'al nediskutebla utilo, kiun mia lingvo alportas jam en la nuna tempo al ĉiu lernanta ĝin (ĉe absoluta malgrandeco da uzata laboro, - ĉar por ĝin ellerni sufiĉas kelkaj tagoj, kaj kompreni ĝin kun helpo de ŝlosilo oni povas jam tuj, sen ĉia antaŭpreparo), - ĝi akiras konstante pli kaj pli grandan rondon da amikoj. La amerika Filozofia Societo (en Philadelphia), speciale sin okupinta en la fino de la pasinta jaro je demando pri ebleco aŭ neebleco krei kaj enkonduki tutmondan lingvon kaj pri formo, kiun devas havi tia lingvo, menciis mian lingvon kun granda laŭdo.

Sed por tio, ke internacia lingvo plene alportu tiun utilon, kiun oni povas de ĝi atendi, estas necese, ke ĝi konstante perfektigadu, por ke ĉiuj estantaj mankoj en ĝi estu publike pridiskutataj, kaj ke nombro da personoj, lernantaj ĝin, energie plikreskadu; ĉar nur tiam, kiam plimulto da eksterlandanoj nin komprenos en tiu ĉi lingvo libere kaj sen ŝlosilo, - nur tiam oni povos diri, ke la lingvo plene atingis sian celon. Por ke tiu ĉi celo povus esti kiel eble plej baldaŭ atingita, estas necese, ke en la internacia lingvo aperadu iu perioda eldonaĵo, kiu per sia ekzisto montrus praktike, kiomgrade la lingvo taŭgas por preciza esprimo de la homa penso, kiomgrade ĝi kapablas anstataŭi aliajn lingvojn (krom la gepatran, kompreneble), kio en ĝi ankoraŭ mankas ktp.; tiu ĉi eldonaĵo okupiĝus pri prilaboro de la lingvo, konatigus inter si amikojn de tiu ĉi lingvo kaj, koncentrigante iliajn disigitajn fortojn, farus ilian agadon efektive fruktodona kaj utila por la ĉocio. El diversaj urboj en Rusujo kaj en eksterlando mi konstante ricevas leterojn kun peto komenci eldonon de perioda folieto en la internacia lingvo. Pri permeso al mi eldonadi similan folieton mi do nun turnas min kun la plej humila peto al la Ĉefa Administracio por presaferoj.

Konsiderante, ke simila eldonaĵo en ĉiu okazo ne povas alporti eĉ plej malgrandan malutilon, sed en favoraj kondiĉoj ĝi povas alporti grandegan utilon, mi permesas al mi esperi, ke la Ĉefa Administracio ne rifuzos al mi mian peton. En okazo, se la Ĉefa Administracio ekdezirus konatiĝi pli proksime kun la afero, pri kiu mi parolis en tiu ĉi skribaĵo, mi aldonas al ĝi po unu ekzemplero de eldonitaj de mi verkoj pri la internacia lingvo.

Lazaro Zamenhof.

Kopio.

Ŝtata blazono.

DIPLOMO.

Konsilantaro de la Imperiestra Varsovia Universitato anoncas, ke estinta dum la 1879./80. kaj 1880./81. lernjaroj en la nombro de studentoj de la Medicina Fakultato de la Imperiestra Moskva Universitato, en la 1-a kaj 2-a kursoj, Lazaro, filo de Marko (Motelo), Zamenhof, enirinte en la nombron de studentoj de la 3-a kurso de la Medicina Fakultato de la Imperiestra Varsovia Universitato en la komenco de la 1881./82. lernjaro, aŭskultis en la 1881./82., 1882./83. kaj 1883./84. lernjaroj sciencojn, instruatajn en la 3-a, 4-a kaj 5-a kursoj de la Medicina Fakultato de tiu ĉi Universitato kaj sur bazo de sukcesaj finekzamenoj, devigaj en la Medicina Fakultato, li, Zamenhof, laŭ decido de la Universitata Konsilantaro, la 5-an de Februaro 1885. jaro, estas konfirmita en la grado de kuracisto. (4)

Sur bazo de tiu ĉi, al li, Zamenhof, estas donita tiu ĉi diplomo kun konforma subskribo kaj almeto de la sigelo.

Urbo Varsovio. La 28-an de Februaro 1885. jaro.

Rektoro de la Imperiestra Varsovia Universitato

Sekreta Konsilanto N. Lavrovskij.

Dekano de la Medicina Fakultato Vl. Brodovskij.

Sekretario de la Konsilantaro kaj Administracio I. Nevskij.

N-ro 43. Sigelo de la Imperiestra Varsovia Universitato.

Rimarko. Mono, ŝuldata por diplomo, estas enpagita en la Varsovia Gubernia Regnokaso sub n-ro 300.

Mi, sube subskribinta, per tio ĉi atestas identecon de tiu ĉi kopio kun ĝia originalo, prezentita al mi, Julijan Josif Ludovik, filo de Viŝrovskij, loĝanta en la urbo Varsovio en la domo n-ro 783, laŭ permeso de Sinjoro Prezidanto de la Varsovia Distrikta Juĝejo, de la 31-a de Julio/12-a de Aŭgusto de tiu ĉi 1885-a jaro, per n-ro 9520, plenumanta oficon de Notario ĉe la Hipotekaj Kancelarioj de la Pacaj Juĝistoj de la urbo Varsovio de Josif Ludovik, filo de Teodor, Viŝrovskij, en oficejo de la sama Notario, estanta en la urbo Varsovio en la domo, n-ro 1771, de kuracisto Lazaro, filo de Marko (Motelo), Zamenhof, loĝanta en la urbo Varsovio en la domo n-ro 40 ĉe la Muranovskaja strato. Dum la komparo fare de mi de tiu ĉi kopio kun ĝia originalo en la lasta ne estis elskrapoj, alskriboj, forstrekitaĵoj kaj neniam eksterordinaraĵoj.

Urbo Varsovio, la 12-an/la 24-an de Oktobro de mil okcent okdek kvina jaro.

Registra n-ro estas 1035. Plenumanta oficon de la Notario Julijan Viŝrovskij. Stampa marko. Sigelo de la Notario.

-----  
Ministerio por internaj aferoj. Ĉefa Administracio por presaferejoj.

Pri rifuzo al s-ro Zamenhof eldonadi en urbo Varsovio en la internacia (Esperanta) lingvo gazeton sub titolo "La internaciulo" (Mefdunarodnik).

Kuracisto Lazaro Zamenhof turnis sin al la Ĉefa Administracio por presaferejoj kun petskribo permesi al li eldonadon en la urbo Varsovio laŭ permeso de anticipa cenzuro, sub lia redaktado ĉiusemajnan gazeton en la internacia (Esperanta) lingvo sub titolo "La internaciulo" ("Mefdunarodnik").

Pro tio, ke en la cenzura oficejo ne estas homo, kiu povas trarigardi eldonaĵojn en novaj inventataj lingvoj, la Ĉefa Administracio por presaferejoj opinius, ke estas necese rifuzi tiun ĉi petskribon.

Mi konsentas  
Pleve  
30.IX.1888.

Tian konkludon mi havas honoron prezenti al  
decido de Via Moŝto,  
Estro de la Ĉefa Administracio por pres-  
aferoj.

E. Feoktistov

-----  
Al sinjoro Varsovia Policestro.

La 3-an de Oktobro 1888. N-ro 4099.

La Ĉefa Administracio por presaferoj havas honoron plej humile peti Vian Moŝton anonci al kuracisto Lazaro Zamenhof, loĝanto en la urbo Varsovio ĉe la strato Przejazd, n-ro 9, ke la petskribo pri la permeso eldonadi en la urbo Varsovio laŭ permeso de anticipa cenzuro sub lia redaktado ĉiusemajnan gazeton en la internacia (Esperanta) lingvo sub la titolo "La internaciulo" ("Meŝdunarodnik") estas rekonita ne kontentigenda.

La stampa pago estas pagita.

Estro Feoktistov

Estro de la kancelario, membro de la konsilantaro Adiĥajevskij.

=====

Post la ricevita rifuzo Zamenhof penis pri eldono de la gazeto en Nürnberg, Germanujo, Tion ni scias el liaj poŝtkartoj al V. Majnov: de la 17(29).3.1889.: "Gazeto internacia" kredeble komencos eliri en julio de tiu ĉi jaro (en Germanujo, ĉar en Rusujo oni ne volis doni al mi la permeson"); de 29.4.1889.: "La eldonadon de ĵurnalo mi jam de longe komencus..., se la ricevo de permeso ne estus tiel malfacila"; el letero de 12.(24).6.1889. al V. Majnov: "Pri ĵurnalo Vi jam ne devas peni, ĉar vidante kiel malfacile ĝi estas en nia lando kun ĵurnalo, mi jam forĵetis mian intencon. De la monato Aŭgusto komencos eliradi ĵurnalo en Nürnberg, sub la redakcio de sinjoro Chr. Schmidt kaj mi promesis esti la ĉefa redaktoro de tiu ĵurnalo." (OV, 476, 477, 481). Efektive unua numero de la ĵurnalo aperis la unuan de septembro 1889. sub titolo: "La Esperantisto. Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto. Sub la kunlaborado de Dr. Esperanto (Dr. L. Samenhof), eldonata de Chr. Schmidt, prezidanto de la klubo mondlingva en Nürnberg. Eliras unu fojon en la monato."

La unua numero de la gazeto enhavis: prospekton en tri lingvoj: la germana, franca kaj Esperanta de la redakcio, komencon de la artikolo "Esperanto kaj Volapük" de D-ro Zamenhof, germane kaj Esperante sur 4,5 paĝoj, poemon Al la Esperantisto en la germana kaj Esperanta lingvoj, bibliografion, germane kaj Esperante, enhavantan 16 unuajn verkojn, anoncojn pri eldonotaj verkoj.

En la "Prospekto" Zamenhof skribas: "La demando pri lingvo tutmonda havas grandegan signifon. Se nia sankta celo estos atingita, tiam nia centjaro brilos eterne en la historio de la homaro. Kun la efektiviĝo de nia afero efektiviĝos la plej kuraĝa, la plej kara sonĝo de la homaro."

La gazeto en formato 35 cm x 25,5 cm ampleksis ok paĝojn.

Organizis eldonadon de la gazeto kaj finance ĝin subtenis hebrea ĵurnalisto Leopold Einstein. La unua numero de la gazeto eniris Rusujon sen ia malhelpo. 100 ekzempleroj de la dua numero de la gazeto laŭ instigo de malfavoranta cenzuristo al la lingvo Esperanto estis ekspeditaj al S. Peterburga cenzurejo. Dum Zamenhofa forestado el Varsovio lia edzino, s-ino Klara Zamenhof, la 1-an de Novembro 1889. sendis vekrian leteron en la rusa lingvo al V. Majnov en S. Peterburgo: "Ne rifuzu, pro Dio, klopedi en la komitato de alilanda cenzuro, por

ke la n-ro 2-a estu permesita". Dank'al interveno de Majnov la afero baldaŭ ordiĝis. (OV, 484, 485). En la fino de la 1889. "La Esperantisto" havis 113 abonantojn (PH, 45; EE 2, 319). Post la morto de Einstein (la 8. de Septembro 1890.) Zamenhof de la 1-a de Oktobro 1890. prenis sur sin eldonadon kaj redaktadon de la gazeto.

Ekde tiu tempo li ne ĝuis ripozon. Li malzorgis sian kuracistan profesion, kvazaŭ forgesis pri vivtenado de la familio. Li malatentis la sanon. Ne regule manĝis kaj malmulte ripozis. Pro tiel malmultaj abonantoj la elspezoj estis pli grandaj ol la enspezoj. En Aŭgusto 1891. Zamenhof proponas organizon de Asocia Societo Esperantista por subteni la gazeton kaj eldonadon de novaj libroj. Unuaj 1000 akcioj kostis po 25 rubloj, sekvantaj akcioj - po 50 rubloj. (OV, 487, 499, 501, 503, 506, 508, 509, 511-513; LZ 1, 115; NR 21, 1959, 82). W.H. Trompeter ankaŭ proponas similan kreaĵon kaj jam mendis dudek akciojn. Bedaŭrinde nur malmultaj amikoj imitis lin. En la fino de la 1891. Zamenhof tro-premita de financaj kaj personaj zorgoj en la lasta numero 11-12 de Nov.-Dec. de gazeto anoncis: "Kun la nuna numero mi devas por kelka tempo interrompi mian laboradon en nia afero ... Mi faris ĉion, kion mi povis, mi tenis min tiel longe, kiel mi povis, kaj nun mi devas foriĝi kaj peni refortigi miajn piedojn, kiuj rifuzas pli min porti."

Zamenhof fordonis ĉiujn siajn rimedojn por helpi la komencon de la Esperanta movado. En tiu sama numero sur la paĝo 82 li skribas: "En la lasta minuto ni ricevis sciigon, kiu ni kun ĝojo komunikas al niaj legantoj: dank'al la helpo de unu el niaj amikoj la estonteco de nia afero estas nun tute certigita." (OV, 141). Tiu nobla amiko, malavara savanto, estis germana termezuristo Wilhelm Heinrich Trompeter, kies nomo kun tiu de Leopold Einstein eterne ripetiĝos de unu al alia generacio de esperantistoj. Li, estante ne riĉa, sindonema kaj multlaboranta viro, ne sole prenis sur sin eldonadon de la gazeto, ne timante ĝian deficiton, sed li ankaŭ difinis salajron de 100 markoj ĉiumonate al la redaktoro.

En Septembro 1892. la gazeto havis 460 abonantojn (OV, 493).

## "POSREDNIK", TOLSTOJ KAJ "ESPERANTISTO"

Kelkaj vortoj pri "Posrednik" (traduko: Peranto). Ĝi estis libroeldonejo, en la jaro 1884. en Moskvo fondita de V.G.Ĉertkov kun partopreno de Lev Tolstoj. Dum 25 jaroj en laboro de "Posrednik" partoprenis Tolstoj; por la eldonejo li speciale verkis verkojn, korektis apartajn eldonojn, faris tradukojn el fremdaj lingvoj. Sub influo de Tolstoj "Posrednik" eldonis multajn rusajn lernolibrojn de Esperanto.

Kelkaj vortoj pri Tolstoj.

Lev Tolstoj (la 9. de Septembro 1828. - 20. de Novembro 1910.) naskiĝis en vasta bieno Jasnaja Poljana (traduko: klara maldensejo, klara arbarherbejo), en distrikto Tula, Rusujo, en la jaroj 1844.-47. studis en la universitato en Kazanĵ, 1851.-1855. estis oficiro, partoprenis en la defendo de Sevastopol, Krimeo, en la 1857., 1860., 1861. vizitis Francujon, Svisujon, Nordan Italujon, Germanujon, Belgujon, Anglujon, konatiĝis kun lernejoj. En Rusujo li akre kritikis edukadon kaj instruadon en ili. En sia bieno en la jaro 1859. li iniciatis

lernejon por infanoj de kamparanoj, enkondukis la plej progresajn metodojn de eduko. Infanoj sidis kiu kie deziris, kiu kiom deziris, kiu kiel deziris. Se lernanto estis absorbita per sia propra projekto, li ne bezonis direkti sin al klaslaboro. Se junulo volis kuri eksteren por streĉi siajn piedojn, li havis permeson fari tion. En lernejo ne estis fiksita programo de instruo. Sola tasko de instruisto konsistis en tio, interesigi klason. Tolstoj skrapis la cirkulantajn rusajn lernolibrojn kiel tedaj kaj arkaikaj, li preferis tiujn, kiujn li ricevis el Usono. Malgraŭ tia pedagogia metodo okupoj iris bonege. Cio tio profunde ofendis administrantojn de la publika instruado, kaj ili fermis lernejon. Ne rezistante al malbono, Tolstoj subiĝis sen batalo.

En la 1855. Tolstoj publikigis rakonton "Sevastopol en majo", en kiu li montris sin severa kontraŭulo de la milito, alportanta al homoj grandajn terurajn mizerojn. Lia prediko de vortoj de Kristo: "Ne rezistu al malbono" signifis, ke ĉiu forto de perforto, ĉiu speco de armita potenco estas kontraŭa al la instruado de Kristo. En la artikolo "Kristanismo kaj patriotismo" Tolstoj ankaŭ montris sin kontraŭulo de la milito, akre kritikis la rusan militistaron, nobelaron, pastaron. Nun li havis armeon kontraŭ si.

Rusujo estis la plej despota lando en Eŭropo. Tolstoj batalis por libereco de la parolo. Por la cara registaro eĉ negativa kritiko estis malagrabla. Cenzuristoj malpermesis liajn teatraĵojn, broŝurojn, kiuj proklamis tiajn ideojn, tial de la 1883. multaj liaj verkoj estis presataj en eksterlando.

Por ricevi respondojn je demandoj, lin turmentintajn, li studis teologion, ellernis malnovan grekan kaj malnovan hebrean lingvojn, por ke li povu en la originalo studi fontojn de la kristana doktrino. En sia serĉo de religia vero li kuraĝis deklari, ke multaj pastroj kaŝas malantaŭ sia digno kaj rito (brulantaj kandeloj, antikvaj ikonoj, bruligo de incenso) malluman nescion. En sia verko "Reviviĝo", publikigita en la 1900. kun multaj forstrekoj, misformoj, li akre kritikis socian ordon, juĝeojn, militistojn, eklezion kaj pro tio la 20-22-an de Februaro (la 4-6-an de Marto laŭ la nova kalendarstilo) 1901. li estis eksigita el eklezio.

Mi donas tradukon de la decido de Sinodo.

La Plej Sankta Tutruslanda Reganta Sinodo la 20-22-an de Februaro 1901. decidis:

"Grafo (5) Tolstoj, al la tuta mondo konata verkisto, ruso laŭ naskiĝo, ortodoksa laŭ bapto kaj sia eduko, delogita de sia fiera prudento, impertinente ekindignis kontraŭ Dio kaj Lia Kristo kaj kontraŭ Lia sankta posedo, evidente antaŭ ĉiuj rezigninte nutrintan kaj edukitan lin patrinon, ortodoksan eklezion, kaj dediĉis sian literaturan laboron kaj talenton, donitan al li de Dio, al disvastigo inter popolo instruojn, kontraŭajn al Jesuo kaj eklezio, kaj al ekstermo el prudentoj kaj koroj de homoj patrujan religion, ortodoksan religion, kiu firmigis universon, per kiu vivis kaj savadis sin niaj prapatroj kaj per kiu ĝis nun tenis sin kaj estis forta la sankta Rusujo. En siaj verkoj kaj leteroj, amase dissemataj de li kaj de liaj disĉiploj tra la tuta mondo, precipe do en la limoj de kara patrujo nia, li predikas, kun ŝaluzo de fanatikulo, frakason de ĉiuj dogmoj de la ortodoksa eklezio kaj de esenco mem de la kristana religio: rifuzas personan vivan Dion, en la Sankta Triunuo gloratan, Kreinton kaj Pripensinton de la universo; neas la Sinjoron Jesuon Kriston - Dio homon, Elaĉetanton kaj Savanton de la mondo, suferintan pro ni homoj kaj pro nia savo kaj reviviĝintan el la mortintoj; neas senseman gravediĝon por homaro de Kristo la Sinjoro kaj

virgecon ĝis naskiĝo kaj post naskiĝo de la Ĉasta Dipatrino virgulino Mario, ne agnoskas transtomban vivon kaj repagon, rifuzas ĉiujn sakramentojn de la eklezio kaj bendonan en ili agon de la Sankta Spirito kaj, insultante la plej sanktajn aferojn de religio de la ortodoksa popolo, ne ekstremit submeti al sarkasmo la Sanktan Eŭkaristion, la plej grandan el sakramentoj. Laŭ ĉio tio ĉi eklezio ne konsideras lin sia ano kaj ne povas konsideri, ĝis kiam li ne pentos kaj ne restarigos sian kunligon kun ĝi." (BJ, 1901, vol. 33, p. 456)

L. Tolstoj estis adepto de Esperanto. En la mezo de la 1889. Tolstoj ricevis de la ĵurnalisto, kunverkinto de rusaj, francaj kaj usonaj gazetoj, Vladimir Vladimiroviĉ Majnov leteron kun la aldonita rusa lernolibro de Esperanto, 1887, 40 p. Trastudinte ĝin, Tolstoj tuj taksis la malgrandan libreton kiel gravegan eventon, utilan por la homaro! Sendinte respondon al Majnov, Tolstoj skribis en sian taglibron la 13-an de Septembro 1889.: "Mi skribis leteron al Majnov pri la lingvo Esperanto. Bona verko (vol. 50, p. 142). En la letero de 13.9.1889. al Majnov Tolstoj skribis: "Mi atente tralegis la lernolibron de la Internacia Lingvo, kiun vi sendis al mi, kaj mi trovas, ke tiu lingvo plene kontentigas la bezonojn de internacia eŭropa (Eŭropo kun la kolonioj, inkluzive Amerikon) lingvo... Mi opinias tiun ĉi agon - ago de unuaranga graveco, kaj tial mi estas tre danko al vi pro la alsendo kaj mi, laŭ miaj fortoj, klopodos disvastigi tiun ĉi lingvon; la plej ĉefa estas mia konvinko pri ĝia nepra neceso" (vol. 64, p. 304).

En poŝtkartoj al V. Majnov Zamenhof skribas: de la 6.(18.).10.1889.: "Mi dankas Vin kore por la kopio de la letero de grafo Tolstoj, kiu faris al mi grandan plezuron. Mi pensas, ke la grafo donis sian promeson el la koro kaj ne el simpla ĝentileco, kaj lia helpo havos por ni grandan signifon." (OV, 484); de la 15.XI.1889.: "Al la grafo Tolstoj Vi povas sendi je mia kalkulo la mezan vortaron germanan kaj plenan rusan" (OV, 485); de la 19.1.1890.: "Leteron al la grafo Tolstoj mi ne skribis; mi sendis al li nur adresaron kaj vortareton kun antaŭparolo" (OV, 486).

En la Esperanta gazeto "La Esperantisto", n-ro 4, 20. de Januaro 1890., p. 27, estas presita letero de Majnov al la redakcio: "Mia amiko! Mi ricevis de la plej glora rusa poeto kaj filozofisto, la s-ro Lev Nikolajeviĉ de Tolstoj en Jasenki, gub. Tula, leteron, en kiu li skribis, ke li ellernis kaj propagandos per ĉiuj fortoj nian karan lingvon."

En Decembro 1889. Majnov sendis al Tolstoj germana-Esperantan vortaron kaj kelkajn librojn en Esperanto. Tolstoj denove dankis al li per letero.

En Aprilo 1894. Vasilij Lvoviĉ Kravcov, distrikta juĝisto en Voroneĝ, sendis al Tolstoj leteron kaj petis en la nomo de la loka grupo de adeptoj de Esperanto, ke Tolstoj esprimu sian opinion pri Esperanto. La 27-an de Aprilo (la 9-an de Majo laŭ la nova kalendarstilo) 1894. Tolstoj skribis leteron al libroldonejo "Posrednik" (=Peranto). Mi donas mian tradukon.

Estimataj sinjoroj,

Mi ricevis viajn leterojn kaj klopodos, kiel mi povos, plenumi vian deziron, t.e. eldiri mian opinion pri ideo de tutmonda lingvo ĝenerale kaj pri tio, kiom la lingvo Esperanto estas konforma al tiu ĉi ideo speciale.

Pri tio, ke homoj iras al unuiĝo en unu brutaron kun unu paŝtisto de prudento kaj amo, kaj ke unu el la plej proksimaj antaŭŝtupoj de tio ĉi devas esti reciproka interkompreniĝo de la homoj, pri tio ĉi povas esti nenia dubo. Por ke

homoj komprene unu alian, estas necese aŭ, ke ĉiuj lingvoj per si mem kunfandiĝu en unu lingvon (se tio iam ajn okazos, tiam nur en tre longa tempo), aŭ, ke scio de ĉiuj lingvoj tiel disvastiĝu, ke ne nur ĉiuj verkoj estu tradukitaj en ĉiujn lingvojn, sed ankaŭ, ke ĉiuj homoj sciu tiel multe da lingvoj, ke ĉiuj havu eblon en tiu aŭ alia lingvo komunikiĝi unu kun alia, aŭ, ke de ĉiuj estu elektita unu lingvo, kiun devige lernus ĉiuj popoloj, aŭ, fine (kiel estas intencata de volapükistoj kaj esperantistoj), ke ĉiuj homoj de diversaj nacioj kreu unu internacian faciligitan lingvon kaj ĉiuj lernu ĝin. En tio ĉi konsistas la ideo de esperantistoj. Ŝajnas al mi, ke la lasta supozo estas la plej racia kaj, ĉefe, efektivebla plej baldaŭ.

Tiel mi respondas la unuan demandon. La duan demandon - kiom la lingvo Esperanto kontentigas la postulojn de internacia lingvo - mi ne povas respondi kategorie. En tio ĉi mi ne estas kompetenta juĝanto. Unu, kion mi scias, estas, ke volapük montris sin al mi tre komplika, Esperanto, kontraŭe, tre facila, per kio ĝi devas montri sin al ĉiu eŭropa homo. (Mi pensas, ke por tutmondeco en vera senco de tiu ĉi vorto, t.e. por unuigi hindojn, ĉinojn, afrikajn popolojn kaj aliajn, estos necesa alia lingvo, sed por eŭropa homo Esperanto estas tre facila).

La facileco de ĝia ellernado estas tia, ke, ricevinte antaŭ ses jaroj Esperantan gramatikon, vortaron kaj artikolojn, skribitajn en tiu ĉi lingvo, mi post ne pli ol du horoj de okupado havis la eblon, se ne skribi, tamen libere legi en tiu ĉi lingvo. En ĉia okazo la oferoj, kiujn alportos ĉiu homo de nia eŭropa mondo, dediĉinte iom da tempo al la ellernado de tiu ĉi lingvo, estas tiel signifaj, kaj rezultoj, kiuj povas veni, se ĉiuj, - almenaŭ eŭropanoj kaj amerikanoj - ĉiuj kristanoj - proprigos al si tiun ĉi lingvon, estas tiel grandegaj, ke oni ne povas ne fari tiun ĉi provon. Mi ĉiam pensis, ke ekzistas nenia pli kristana scienco ol scio de lingvoj, tiu scio, kiu ebligas komunikadon kaj unuigadon kun la plej granda nombro da homoj. Plurfoje mi vidis, kiel homoj fariĝis malamikoj unu kontraŭ alia nur pro meĥanika malhelpo al reciproka komprenado. Kaj tial ellerno de Esperanto kaj ĝia disvastigo estas sendube kristana afero, helpanta starigon de la Regno de Dio, de tiu afero, kiu estas la ĉefa kaj sola destino de la homa vivo.

Moskvo, la 27-an de Aprilo 1894.

Lev Tolstoj.

Originala letero de Lev Tolstoj estas presita en la Jubilea eldono de verkoj de Lev Tolstoj, vol. 67, p. 101, 102, kaj en la libro "L.Zamenhof. Mejdunarodnij jazik "Esperanto" (traduko: L.Zamenhof. Internacia lingvo "Esperanto"), 1895, p. III, IV, V.

Tradukoj de letero estas presitaj en:  
Esperantisto, n-ro 7 (55), 15. Julio 1894., p. 99, 100,  
L.Zamenhof. Fundamenta krestomatío, 1903, p. 287, 288,  
J.Dietterle. Originala verkaro de L.Zamenhof, 1929, p. 290, 291,  
The North American Esperanto Review, Jan.-Feb. 1960, p. 18, 19,  
Heroldo de Esperanto, n-ro 1300, 1 Marto 1960, p. 1,  
Nuntempa Bulgario, n-ro 6, 1961, p. 34, 35,  
Marjorie Boulton. Zamenhof, aŭtoro de Esperanto, 1962, p. 79, 80.

Li forlasis iom post iom la luksan vivon, komencis pli kaj pli proksimiĝi al la simpla vivo de kamparanoj, vestis sin tre simple, fariĝis vegetaristo, multe okupiĝis per fizika laboro, fordonis siajn posedaĵojn al sia familio kaj rezignis



honorariojn por siaj verkoj. Li komencis liberigi siajn servutulojn: filantropa ago, kiun la registaro kaj bienposedantoj rigardis kun suspekto. Li urĝis unusolan imposton nur je tero. Vastaj bienoj estis bazo de la nobelara riĉeco. Unusola imposto devigus la nobelaron dispartigi siajn bienojn kaj disdoni teron al kamparanoj. La sugesto renkontis koleron de la caro kaj nobelaro. (SR, 44-48).

La registaro de caro Aleksandro la Dua estis devigita liberigi kamparanojn el servuteco. Cara dekreto estis proklamita la 19-an de Februaro (la 3-an de Marto laŭ la nova kalendarstilo) 1881. Anstataŭ servuteco la registaro metis kamparanojn en kondiĉojn, de ankoraŭ pli peza por ili ekonomia jugo. Jen popola kanteto:

Otpustili krestjan na svobodu  
 V devjnatdcatij denj fevralja,  
 Tolko zemli ne dali narodu  
 V devjnatdcatij denj fevralja.  
 Vstavaj, podimajsja raboĉij narod,  
 Idi na borjbu brat golodnij.  
 Razdajsja kliĉ mesti narodnoj,  
 Vpered, vpered, vpered, vpered,  
 vpered.

Bez zemli muĝiki propadajut,  
 A dvorjane i radi tomu,  
 Ĉto deŝevle narod nanimajut,  
 Muĝikov na rabotu svoju.  
 Vstavaj, podimajsja raboĉij narod,  
 . . . . .

L. Tolstoj estis enterigita en arbaro de Jasnaja Poljana sen partopreno de la ortodoksaj pastroj.

El verkoj de Tolstoj aperis en Esperanto tradukoj de multaj malgrandaj rakontoj: Sieĝo de Sevastopolo, Kaŭkaza militkaptito, Du maljunuloj, Unu animo en ĉiuj, Tri mortoj, La morto de Ivan Iljiĉ, Kristanismo kaj patriotismo, Unua brandfaristo, Dio ĉiam veron vidas, sed ne tuj ĝin aperigas, La konfeso, Dio unu por ĉiuj, Unua ŝtupo, Per kio homoj estas vivaj, Dio vidas veron, Kie estas amo, tie estas Dio, Tri rakontoj, La vojo de l'vivo, Korneo Vasiljev, La morto de Danton ktp.

Ivan Genadijeviĉ Ŝirjajev tradukis grandan romanon "Milito kaj paco" de L. Tolstoj. Traduko estas manuskripta.

La plej granda bato venis en la 1895. En la n-ro 2-a, 1895., p. 26, 27, de la gazeto "Esperantisto" aperis artikolo pri "Posrednik": "Komencante de la nuna numero, al la nombro de konstantaj kunlaborantoj de nia gazeto aliĝis la redakcio de "Posrednik". Tiu ĉi redakcio, al kiu apartenas ankaŭ la glora verkisto grafo L. Tolstoj, en Rusujo estas sufiĉe konata, sed por niaj amikoj ekster Rusujo ni devas diri kelke da vortoj pri "Posrednik". Pri sia esenco parolas malsupre "Posrednik" mem; sed ĉar, parolante pri si, "Posrednik" ofte uzas formon de parolo pure eklezian (preĝejan), kio povus elvoki ĉe niaj legantoj la eraran opinion, ke ni donas al nia gazeto eklezian karakteron, tial ni volas iom klarigi tiun ĉi punkton. "Posrednik" tute ne estas - kiel povus erare ŝajni laŭ kelkaj esprimoj - ia institucio, kiu batalas por tiu aŭ alia ekstera formo de religioj. La idealoj, por kiuj laboras "Posrednik", estas: amo kaj frateco inter

#### Traduko

Kamparanoj ricevis liberon  
 La deknauan de dua monat',  
 Nur ne donis al ili la teron  
 La deknauan de dua monat'.  
 Leviĝu, stariĝu malsata popol',  
 Kaj ek al batal' findecida;  
 Voĉ' sonu de l' venĝo senbrida -  
 Al venk! Al venk! Al venk! Al venk!  
 Al venk!  
 Fikampuloj sen tero pereas,  
 Kaj nobeloj - la mastroj de l' ter',  
 Pro la eta dungpago ricevas  
 Nur profiton de tia liber'!  
 Leviĝu, stariĝu malsata popol'!

ĉiuj homoj, forigo de la militoj, pureco de la moroj, justeco kaj kompato al la bestoj, deteniĝo de la alkoholo, tabako k.t.p. La laborado de "Posrednik" estas sekve tre parenca al la nia, kaj tial sendube ĉiuj niaj legantoj salutos kun plezuro la aliĝon de "Posrednik" al niaj kunlaborantoj.

"Posrednik" laboras pro tio, pro kio laboris siatempe Kristo kaj la unuaj kristanoj (kaj por kio ankaŭ nun kaj en ĉiuj tempoj laboras kaj laboradis ĉiuj noblaj kaj honestaj homoj, tute egale, al kia ajn nacio aŭ ekstera religio ili apartenas), tial en la verkoj de "Posrednik" la legantoj ofte trovas la esprimojn "instruo de Kristo", "regno de Dio" k.t.p. Sed ni petas la legantojn juĝi ne laŭ la kutima sono de la vortoj, sed laŭ ilia enhavo kaj ne miksi tiun ĉi puran, ĉiuhoman filozofian religion kun tio, kio ni kutimis ordinare vidi sub la ekstera formo de diversaj religioj. Pri la ksteraj diversaj apartaj religiaj formoj, kiuj sub la mantelo de altaj principoj semadis ĉiam nur malamon inter la homoj, ne parolas "Posrednik" kaj neniam parolados ankaŭ ni. Ĉion, kio akcelas fratecon inter la homoj, ni saltados ĉiam kun ĝojo; ĉio, kio semas disputon kaj malamon inter la homoj, restu ĉiam for de ni.

Por la artikoloj de "Posrednik" ni malfermas specialan rubrikon sub la titolo "Folieto de Posrednik". (OV, 201, 202).

Sur la p. 27, 28 ni legas:

"De la redakcio de eldonoj de "Posrednik".

Alpaŝante al kunlaborado en la gazeto "Esperantisto", la redakcio de eldonoj de "Posrednik" trovas bezona diri kelke da vortoj pri tio, kiaj estas la tendenco de "Posrednik", por ke la legantoj de tiu ĉi gazeto sciu, kun kiu ili havos aferon kaj kial "Posrednik" aliĝas al la "Esperantisto".

La redakcio de "Posrednik" fondiĝis en Rusujo antaŭ 10 jaroj. Komence motivo por ĝia fondiĝo estis la deziro, fari akireblaj por la popolo la verkojn de la plej bonaj rusaj kaj eksterlandaj verkistoj kaj pentristoj.

La agado de la redakcio ricevis direkton religia - moralan en la spirito de la pura instruado de Kristo, ĉar tiaj estis la konvinkoj de la homoj, kiuj konsistigis per si la redakcion. La eldonoj de "Posrednik" estas dediĉataj la plej ĉefe al la ideo de paca spirita disvolviĝo kaj unuiĝo de la homoj kaj de ĉio vivanta en unu tutmondan frataron sur la principoj de Prudento kaj Amo, kiuj estas perfortecon kaj superstiĉecon.

En la unuaj jaroj la agado de la redakcio limigadis sin al elektado kaj simpligado de la plej bonaj literaturaj kaj artaj verkoj kaj eldonado de ili por la popolo. Sed kun la tempo disvolviĝadis ĉiam pli kaj metadis profundajn radikojn en la societo, la direkto, akceptita de la redakcio, kaj tiu ĉi cirkonstanco elvokis la aperon de multaj literaturaj verkoj en la spirito kaj direkto de la redakcio, sed ne aliĝeblaj per sia formo al la simpla popolo kaj ne oportune simpligeblaj. De alia flanko unu el la ĉefaj komencaj celoj de la redakcio - kontraŭbatalado kaj elpuŝado de la memorala kaj sensenca kolportafa literaturo - postulis grandajn materialajn elspezojn por konkurado per malkareco de la eldonoj. Tiuj ĉi du kaŭzoj devigis la redakcion malfermi novan parton de agado: "por intelligentaj legantoj". La tendenco de tiu ĉi serio estas tute egala kun la tendencoj de la eldonoj popolaj; sed tiuj ĉi novaj eldonoj diferencas per la formo kaj prezo, vastigante per tio ĉi la rondon de la aŭtoroj kaj legantoj kaj donante al la redakcio kelkan profiton, kiu iras por kovrado de la elspezoj de la eldonoj popolaj. En tia maniero aperis tiuj ĉi du apartaĵoj de la agado de "Posrednik",

kiuj alkondukis al la sekvantaj rezultatoj: en la daŭro de 10 jaroj ni eldonis 250 verkojn de aŭtoroj de diversaj nacioj (227 librojn kaj 23 pentrafojn).

Servante per helpo de la vorto al la spirita disvolviĝo kaj unuiĝo de la homoj, la redakcio de "Posrednik" en la lasta tempo ne povis ne turni sian atenton sur unu el la plej bonaj potencaj rimedoj por la disvastigo de tia disvolviĝo kaj unuiĝo kaj ne ekuzi ĝin por la celoj de sia servado. Tia rimedo, laŭ nia opinio, fortigita parte per nia persona sperto, estas la lingvo internacia Esperanto. Stariĝante sur la fundamenton de unu por ĉiuj facile aliĝebla lingvo internacia Esperanto, ni esperas disvastigi nian agadon, komencinte komunikiĝadon kun egale kun ni pensantaj homoj de diversaj landoj kaj popoloj kaj altirante ilin al kunsento kaj partoprenado en la elektita de ni servado - al la kreo de regno de Dio.

Ĉar kiel organo de la lingvo internacia Esperanto en la nuna tempo servas la gazeto "Esperantisto", tial ni volas ekuzi ĝin por la atingado de la celoj de nia servado. Ni intencas publikigadi en ĝi artikolojn de niaj kunlaborantoj pri la ĉiujn interesanta demando de la spirita disvolviĝo kaj unuiĝo de la homoj kun rimarko, ke tiuj ĉi artikoloj kaj artikoletoj estas presataj en la nomo de la redakcio de "Posrednik".

En la nuna numero de la gazeto ni publikigas la respondon de unu el niaj kunlaborantoj, L.N.Tolstoj, je la disputa demando: "Prudento aŭ kredo?"

Ni esperas, ke ankaŭ niaj fratoj laŭ spirito, disfetitaj en la tuta mondo, dividados kun ni siajn pensojn kaj sentojn pri la demandoj, kiuj ĉiujn nin grave interesas, kaj ke ili por organo de tiu ĉi interŝanĝo de pensoj elektos la plej facilan en la mondo lingvon Esperanto.

Redakcio de la eldonoj de "Posrednik".  
Moskvo, Zubono, Dolgij pereulok, domo de Njunin."

En tiu sama numero sur la paĝoj 28-30 aperis neplena kaj libera traduko de la letero de la 26-a de Novembro 1894. de Tolstoj al A.H.Rozen sub la titolo "Prudento aŭ Kredo?"

E.Privat kaj A.Zakrzewski en siaj "Historio de Esperanto" eraregas, dirante, ke en la n-ro 2, 1895., de "Esperantisto" aperis traduko de la malgranda verketo "Prudento kaj kredo" de L.Tolstoj. (PH, 55; ZH, 49).

S-ano F.Gorizdro en Taŝkent, Sovetujo, per la aerletero de la 9-a de Julio 1963. informis min, ke li en la 90 volumna verkaro de Tolstoj ne trovis mallongan verketon "Razum i vera" (traduko: Prudento kaj kredo). La 19/20 de Aŭgusto 1963. en la biblioteko de la ŝtata universitato en Chicago, Usono, en la verkaro de Tolstoj mi vane serĉis la verketon "Razum i vera". Muzeo-bieneto de L.Tolstoj "Jasnaja Poljana" per la registrita letero de la 12-a de Aŭgusto 1963. informis min, "ke en la biblioteko en la jubilea eldono de la verkaro de L. Tolstoj la artikolo "Razum i vera" ne troviĝas." La malnova s-ano Anatolo Koŝ (la 16. de Julio 1887. - la 18. de Januaro 1964.) en Lvov, Sovetujo, kiu en la 1914. interparoladis kun Zamenhof (NB, 22) per la aerletero de la 19.10.1963. sciigis min, ke li en la 90 volumna verkaro de Tolstoj ne trovis la verketon "Razum i vera".

Kopion de la letero al A.H.Rozen sendis al mi Muzeo-bieneto de L.Tolstoj "Jasnaja Poljana". Mi donas mian tradukon de la letero.

La letero al A.H.Rozen. La 26. de Novembro 1894. Jasnaja Poljana.

Vi demandas min, Anna Hermanovna: (6)

- 1) Ĉu devas homoj, sendube distingigantaj sin per prudento, serĉi esprimojn en vortoj de ili perceptitaj veroj de la interna vivo?
- 2) Ĉu oni devas aspiri al plena konscio en sia interna vivo?
- 3) Per kio ni devas nin gvidi en minutoj de lukto kaj ŝanceliĝoj, por ekscii, ĉu en ni efektive parolas nia konscienco aŭ rezono, subaĉetita de nia malforteco? Tiun ĉi trian demandon pro mallongeco mi esprimis per propraj vortoj, mi esperas, ke mi ne ŝanĝis ĝian sencon.

Tiuj ĉi tri demandoj, laŭ mia opinio, alkondiĝas al unu - al dua, ĉar, se oni ne devas aspiri al plena konscio de sia interna vivo, do ankaŭ oni ne devas kaj ne eble estos esprimi per vortoj perceptitajn de ni verojn kaj, en minutoj de ŝanceliĝo, per nenio oni povos gvidi sin por tio, por ekscii, ĉu parolas en ni nia konscienco aŭ erara rezono. Sed se oni devas aspiri al la plej granda konscio, alirebla por racio de homo (kia ajn estus tiu ĉi racio), tial oni devas esprimadi per vortoj de ni perceptitajn verojn, kaj per tiuj ĉi samaj, alkondukitaj ĝis plena konscio kaj esprimitaj veroj, oni devas gvidi sin en minutoj de lukto kaj ŝanceliĝoj. Kaj tial mi respondas al Vi je meza kaj principa demando - pozitive, nome, ke ĉiu homo por plenumo de sia destino sur la tero kaj por atingo de vera bono (kio ĉiam akordas) devas ĉiam ĉiujn fortojn de sia prudento streĉi por klarigo al si mem tiujn religiajn dogmojn, laŭ kiuj li vivas, t.e. sencon de sia vivo.

Mi ofte renkontadis inter analfabetoj laboristoj - terfosistoj, kiuj bezonas kalkuladi kubajn mezurojn, disvastigitan konvinkon, ke matematika kalkulo estas trompa kaj ke al ĝi oni ne devas konfidi. Ĉu pro tio, ke ili ne scias matematikon, aŭ pro tio, ke homoj, kalkulintaj por ili matematike, ofte intence aŭ sentintence trompadis ilin, sed opinio pri nekredindeco kaj netaŭgeco de matematiko por difino de mezuroj stariĝis inter analfabetaj laboristoj kaj fariĝis por plimulto senduba vero, kiun ili eĉ ne trovas necese pruvadi.

Tia sama opinio stariĝis ankaŭ inter homoj, mi diras kuraĝe, nereligiaj - opinio pri tio, ke racio ne povas solvadi religiajn demandojn, ke apliko de racio al tiuj ĉi demandoj estas ĉefa kaŭzo de eraroj, ke solvo de religiaj demandoj per racio estas krima fiereco. Mi diras tion ĉi pro tio, ke esprimita en viaj demandoj dubo pri tio, ĉu oni devas aspiri al konscio en siaj religiaj konvinkoj, povas esti bazita nur sur tiu ĉi supozo, nome sur tio, ke racio ne povas esti aplikata al solvo de religiaj demandoj, kaj dume tia supozo estas tiom same stranga kaj evidente erara, kiel ankaŭ supozo pri tio, ke kalkulo ne povas solvi matematikajn demandojn.

Al homo estas donita rekte de Dio nur unu ilo por ekkoni sin kaj sian rilaton al mondo: alia ne ekzistas, kaj tiu ĉi ilo estas racio, kaj subite oni diras al li, ke racion li povas uzi por klarigo de siaj hejmaj, familiaj, mastrumaj, politikaj, sciencaj, artistaj demandoj, sed nur ne por klarigo de la plej gravaj veroj, de tiuj, de kies ekkono dependas lia tuta vivo, homo neniel devas uzi racion, sed devas ekkonadi tiujn ĉi verojn ekster racio, dum ekster racio homo povas nenion ekkoni. Oni diras: ekkonu revelacion per kredo, sed ankaŭ kredi homo ne povas ekster racio. Se homo kredas al tio kaj ne kredas al tio ĉi, tio estas nur tial, ke lia racio diras al li, ke al tio ĉi oni ne devas, kaj al tio ĉi oni devas kredi. Diri, ke homo ne devas gvidi sin per racio - tio ĉi estas tute tiel same, kiel al homo, portanta lampeton en malluma subterafo, diri, ke por

tio, por eliri el subteraĵo kaj trovi vojon, oni devas estingi lampeton kaj gvidadi sin ne per lumo, sed per io alia.

Sed eble oni diros al Vi, kiel ankaŭ Vi diras en Via letero, ke ne ĉiuj homoj estas naturdotitaj per granda prudento kaj speciala kapablo esprimadi siajn pensojn, kaj ke tial nelerta esprimo de siaj pensoj pri religio povas konduki al eraro. Je tio ĉi mi respondos per vortoj de Evangelio: "Kio estas ĉaŝita de saĝuloj, estas malĉaŝita al infanetoj". (7) Kaj tiu ĉi sentenco ne estas trograndigo aŭ paradokso, kiel oni kutimas juĝi pri tiuj sentencoj de Evangelio, kiuj ne plaĉas al ni, sed tio ĉi estas aserto de la plej simpla kaj senduba vero pri tio, ke al ĉiu estaĵo en la mondo estas donita leĝo, kiun tiu ĉi estaĵo devas sekvi, kaj per ekkono de tiu ĉi leĝo al ĉiu estaĵo estas donitaj konformaj organoj. Kaj tial ĉiu homo estas naturdotita per racio, kaj en tiu ĉi racio al ĉiu homo estas malĉaŝita leĝo, kiun li devas sekvi. Tiu ĉi leĝo estas ĉaŝita nur de tiuj homoj, kiuj ne deziras sekvi ĝin, sed por tio, por ne sekvi leĝon, ili rezignas racion kaj anstataŭ tio, ke por ekkono de vero uzi donitan al ili por tio ĉi racion, ili uzas por tio ĉi je kredo akceptitajn indikojn de tiaj samaj, kiel ili, homoj, rezignintaj racion.

Tamen leĝo, kiun devas sekvi homo, estas tiel simpla, ke ĝi estas alirebla por ĉiu infano, tiom pli, ke homo ne bezonas mem denove eltrovi leĝon de sia vivo. Homoj, vivintaj antaŭ li, eltrovis kaj esprimis ĝin, kaj homo bezonas nur ekzameni ĝin per sia racio, akcepti aŭ ne akcepti tiujn tezojn, kiujn li trovas esprimatajn en tradicio, t.e. ne tiel kiel konsilas tion ĉi fari homoj, dezirantaj ne plenumi leĝon: per tradicio ekzameni racion, sed kontraŭe: per racio ekzameni tradicion. Tradicioj povas esti de homoj kaj eraraj, sed racio certe estas rekte de Dio kaj ne povas esti mensoga. Kaj tial por ekkono kaj esprimo de vero estas necesaj neniam specialaj elstaraj kapabloj, sed estas necese nur kredi al tio, ke racio estas ne sole la plej alta dia eco de homo, sed ankaŭ sola ilo por ekkono de vero. Speciala prudento kaj talento estas necesaj ne por ekkono kaj klarigo de vero, sed por pripensado kaj klarigo de mensogo. Unu fojon dekliniĝinte de indikoj de racio, ne konfidinte al ĝi, sed konfidinte je vorto al tio, kio prezentas sin kiel vero, homoj amasigas kaj akceptas je kredo, ordinarare en formo de leĝoj, revelacioj, dogmoj, tiajn komplikatajn nenaturajn kaj kontraŭparolajn tezojn, ke por tio, por klarigi ilin kaj kunligi kun vivo efektive estas necesa granda subtileco de prudento kaj speciala talento. Estas necese nur imagi al si homon de nia mondo, edukitan laŭ religiaj dogmoj de kia ajn kristana religio - katolika, ortodoksa, protestanta, - kiu ekdeziros klarigi al si religiajn dogmojn, inokulitajn al li de infaneco, kaj ekdeziros kunligi ilin kun la vivo, - kian komplikatan spiritan laboron li devas plenumi, por akordigi ĉiujn kontraŭparolojn, estantajn en religio, inokulita al li per eduko. Dio estas kreinto kaj bona, li kreis malbonon, ekzekutas homojn kaj postulas pentofaron ktp., kaj ni konfesas leĝon de amo kaj pardono, kaj ni ekzekutas, militas, forprenas proprajn de malriĉuloj ktp., ktp...

Kaj jen por disligo de tiuj ĉi nesolveblaj kontraŭparoloj, aŭ pli ĝuste, por ĉaŝi ilin de si, estas necese multe da prudento kaj specialaj talentoj; sed por tio, por ekkoni leĝon de sia vivo aŭ, kiel Vi Vin esprimas, por alporti al plena konscio sian kredon, estas necesaj neniam specialaj spiritalaj talentoj, estas necese nur allasi nenion kontraŭan al racio, ne nei racion, sed religie gardi sian racion kaj kredi sole al ĝi.

Se senco de la vivo aperas al homo ne klara, tio ĉi pravas ne tion, ke la racio ne taŭgas por klarigo de tiu ĉi senco, sed nur tion, ke per kredo estis

akceptita tro multe da neprudenta, kaj oni devas forĵeti ĉion tion, kio ne konfirmiĝas per la racio. Kaj tial mia respondo je Via principa demando pri tio, ĉu oni devas aspiri al konscio en sia interna vivo? - estas tia, ke tio ĉi estas la plej necesa kaj grava afero, kiun ni povas fari en la vivo. Ĝi estas necesa kaj grava tial, ke la sola racia senco de nia vivo konsistas en la plenumo de la volo de Dio, sendinta nin en tiun ĉi vivon. Sed la volo de Dio estas ekkonata ne per ia neordinara miraklo, per skribo de leĝo per dia fingro sur ŝtonajn tabulojn, aŭ per verko de senerara libro kun helpo de la sankta spirito, aŭ per senerareco de ia sankta persono aŭ aro da homoj, sed nur per agado de la racio de ĉiuj homoj, transdonantaj unu al alia per fero kaj vorto verojn, pli kaj pli klarigantaj ilian konscion. Tiu ĉi ekkono neniam estis kaj estos plena, sed konstante pligrandiĝas, laŭ mezuro de movado de la homa vivo: ju pli longe ni vivas, des pli klare kaj plene ni komprenas la volon de Dio kaj, sekve, ankaŭ tion, kion ni devas fari por ĝia plenumo. Kaj tial mi pensas, ke klarigo fare de ĉiu homo (kia ajn li mem kaj aliaj lin kalkulus malgranda: malgrandaj ja estas grandaj) de tiu tuta religia vero, kiu estas alirebla por li, kaj ĝia esprimo per vortoj (ĉar esprimo per vortoj estas unu senduba signo de plena klareco de penso) estas unu el la plej ĉefaj kaj sanktaj devoj de ĉiu homo.

Mi tre ĝojos, se mia respondo, almenaŭ parte, kontentigos Vin. Pardonu, ke mi longe ne respondis, mi estis tre okupita en tiu ĉi tempo.

(LT, vol. 67, p. 274-277).

L.Tolstoj

En la responda letero de la 18-a de Decembro 1894. A.H.Rozen skribis al Tolstoj: "Bedaŭrinde la cenzuro forprenis de mi ĝojon vidi Vian leteron presitan en nia verkokolekto. Al ni oni kategorie rifuzis preterlasi Vian respondon je miaj demandoj".

Rimarko. En la registrita letero de la 2. de Novembro 1963. (poŝtstampo) la Muzeo-bieneto de L.Tolstoj informis min, ke en la Muzeo estas jenaj esperantaĵoj:

1. "La Esperantisto", n-ro 2, Novembro 1889.; n-ro 7, Aprilo 1890.; "Esperantisto", n-ro 5, Majo 1892.; n-ro 2 (62), la 15. de Februaro 1895.;
2. Dr. Esperanto. Polnij slovarj esperantskago (meĵdunarodnago) jazika. 1889., XV, 232 p. (En la letero de la 15. de Novembro 1889. al Majnov Zamenhof skribas: "Al la grafo Tolstoj Vi povas sendi je mia kalkulo la mezan vortaron germanan kaj plenan rusan" kaj en la letero de la 19. de Januaro 1890.: "Leteron al la grafo Tolstoj mi ne skribis; mi sendis al li nur la adresaron kaj vortareton kun antaŭparolo");
3. The Universal Language "Esperanto". Complete Instruction - Book with two Vocabularies translated after the Russian of Dr.L.Samenhof by R.H.Geoghegan. Nürnberg 1892. (En la libro estas dediĉo: "Al lia ilustra moŝto, la grafo Lev Nikolajevič Tolstoj, kun humila respektama saluto de l'tradukinto. R.H.G. Junio 1892. East Sound; Washington, Unuigitaj Ŝtatoj Amerikaj"). (En la angla lingvo estas illustrious - fama, glora, eminenta).
4. Polnij kurs teorii i praktiki esperantskago jazika, obrabotannij dlja ruskiĥ. Novij učebnik v X urokaĥ. V.V.Bitner. 1905. IV, 60 p.

Pro tiuj artikoloj kaj letero la cara cenzuro, ne dezirante, ke la "Esperantisto" disvastigu nedeziratajn ideojn de Tolstoj en Rusujo, malpermesis ensendadon de la gazeto "Esperantisto" en Rusujon. Pri tio la 9 (21)-an de Majo 1895. Zamenhof skribis al J.Guminski: "La kaŭzon, kial la "Esperantisto" estas malpermesita, oni ne volis al ni diri, sed mi supozas, ke ĝi fariĝis kredoble

pro la artikolo en la n-ro 2 aŭ entute pro la kunlaborado de "Posrednik". (OV, 497). Zamenhof provis ensendi la gazeton en Rusujon en fermitaj kovertoj, sed cirkonstancoj malebligis la aferon kaj la 5-6-a numero, Majo-Junio 1895. (efektive ĝi aperis en Aŭgusto 1895.) de la "Esperantisto" estis la lasta. Preskaŭ 3/4 de ĉiuj abonantoj loĝis en Rusujo, restis 172 en eksterlando (en Aprilo 1895.: 44 en Germanujo, 38 - Francujo, 30 - Svedujo, 13 - Finnlando, 12 - Portugalujo, 6 - Un. Ŝtatoj, 5 - Bulgarujo, 3 - Aŭstrujo, 3 - Italujo, po 1 en Anglujo, Argentino, Aŭstralio, Belgujo, Nederlando, Svisujo, Tunizio, 11 poŝtaj abonantoj). (ZH, 49, 55).

"La Esperantisto" en la n-ro 4, Aprilo 1892., ŝanĝis sian titolon en "Esperantisto" (OV, 55). "La Esperantisto" havis abonantojn: en la fino de la 1889. - 113 (PH, 45; EE 2, 319); en Aŭgusto 1892. - 460 (OV, 493); en Decembro 1892. - 544: Anglujo - 1, Belgujo - 1, Brazilo - 1, Bulgarujo - 3, Francujo - 10, Germanujo - 124, Hispanujo - 2, Italujo - 4, Nordameriko - 6, Portugalujo - 1, Rusujo - 335, Svedujo - 56; en la 1893.: la 15. de Marto - 632; la 15. de Aprilo - 670; la 15. de Majo - 718; la 15. de Junio - 740; la 15. de Julio - 782; la 15. de Aŭgusto - 805; la 15. de Septembro - 836; la 15. de Oktobro - 860; la 15. de Novembro - 877; la 15. de Decembro - 889: Anglujo - 1, Aŭstrujo - 10, Belgujo - 1, Bulgarujo - 3, Finnlando - 4, Francujo - 44, Germanujo - 87, Hispanujo - 4, Italujo - 2, Portugalujo - 2, Rusujo - 660, Svedujo - 64, Usono - 7. (EN, 3 (39), 15.3.1893. ... 12 (48), 15.12.1893.); en la 1894.: la 15. de Marto - 460; la 15. de Majo - 508; la 15. de Julio - 533; la 15. de Oktobro - 568; la 15. de Decembro - 596: Anglujo - 1, Aŭstrujo - 4, Aŭstralio - 1, Bulgarujo - 7, Finnlando - 8, Francujo - 27, Germanujo - 92, Hispanujo - 4, Italujo - 5, Norvegujo - 1, Portugalujo - 13, Rusujo - 373, Svedujo - 55, Svisujo - 1, Usono - 4. (EN, 3 (51), 15.3.1894. ... 12 (60), 15.12.1894.).

A. Zakrzewski erare diras, ke en Decembro 1894. estis 717 abonantoj; devas esti 596 (279 = 1-279 abonantoj ĉe L.Zamenhof kaj 317 = 401-717 abonantoj ĉe W.Trompeter). (ZH, 55; EN, 12 (60), 15.12.1894.).

Tiu sama eraro estas en la Enciklopedio de Esperanto (EE 2, 319) kaj en la "Bibliografio de internacia lingvo" de P.E. Stojan, n-ro 3190. En la 1895. estis abonantoj: la 15. de Januaro - 20; la 15. de Februaro - 234; la 15. de Marto - 392; la 15. de Aprilo - 425 (EN, 1(61), 15.1.1895... 4(64), la 15. de Aprilo 1895.).

En la lasta numero de la "Esperantisto" Zamenhof anoncas: "Jam post la pretigo de tiu ĉi numero la cirkonstancoj aliĝis en tia maniero, ke la plua eldonado de la gazeto al la nuna redaktoro fariĝis absolute ne ebla. Tial ni kun tiu ĉi numero ĉesas eldonadi la gazeton ...

Kun doloro en la koro mi devas por kelka tempo diri al Vi adiaŭ, miaj karaj amikoj kaj kunbatalantoj. Kiam la cirkonstancoj pliboniĝos, mi komunikiĝos kun Vi denove. Dume mi petas Vin alporti Vian fidon kaj helpen al tiuj amikoj, kiuj fondos aliajn gazetojn por 'nia afero.'" (OV, 209, 210).

Tial finiĝis historio de la unua kaj sola esperantista gazeto, kiu dum ses jaroj (la 1. de Septembro 1889. - la 15. de Aŭgusto 1895.) estis centro de la kura-tuta movado. De la unua numero la gazeto fariĝis plej efika centrigilo kaj kura-ta ĝigilo inter diverslandaj adeptoj, kiuj antaŭe havis neniun alian ligilon ol sian korespondadon kun Zamenhof. La gazeto donis bonajn tekstojn, kiuj helpis al pli profunda studado de la lingvo, ĝi ebligis al Zamenhof doni ĝeneralajn klarigojn al ĉiuj per siaj "Respondoj al amikoj" kaj samtempe ĝi informadis pri progresoj de Esperanto.

"La Esperantisto".

Numeroj	Datoj	Jaroj	Paĝoj	Numeroj	Datoj	Jaroj	Paĝoj
1	1.de Sep. 1889.	1.	1- 8	10	Okt. 1892.	3.	145-160
2	1.de Nov. "	"	9- 16	11	Nov. "	"	161-176
3	20.de Dec. "	"	17- 24	12	Dec. "	"	177-194
4	20.de Jan. 1890	"	25- 28				
5	25.de Feb. "	"	29- 32	1(37)	Jan. 1893.	4.	1- 16
6	25.de Mar. "	"	33- 36	2(38)	Feb. "	"	17- 32
7	25.de Ap. "	"	37- 40	3(39)	15.de Mar. "	"	33- 48
8	25.de Majo "	"	41- 44	4(40)	15.de Ap. "	"	49- 64
Numeroj de Junio, Julio, Aŭgusto ne aperis.				5(41)	15.de Majo "	"	65- 80
9	30.de Sep. "	"	45- 48	6(42)	15.de Junio "	"	81- 96
10	Okt. "	"	49- 52	7(43)	15.de Julio "	"	97-112
11	Nov. "	"	53- 56	8(44)	15.de Aŭg. "	"	113-128
12	Dec. "	"	57- 60	9(45)	15.de Sep. "	"	129-144
				10(46)	15.de Okt. "	"	145-160
1	Jan. 1891.	2.	1- 8	11(47)	15.de Nov. "	"	161-176
2	Feb. "	"	9- 16	12(48)	15.de Dec. "	"	177-192
3	Mar. "	"	17- 24				
4	Ap. "	"	25- 32	1(49)	15.de Jan. 1894.	5.	1- 16
5	Majo "	"	33- 40	2(50)	15.de Feb. "	"	17- 32
6	Junio "	"	41- 48	3(51)	15.de Mar. "	"	33- 48
7	Julio "	"	49- 56	4(52)	15.de Ap. "	"	49- 64
8	Aŭg. "	"	57- 64	5-6(53-54)	15.de Majo "	"	65- 96
9	Sep. "	"	65- 72	7(55)	15.de Julio "	"	97-112
10	Okt. "	"	73- 80	8(56)	15.de Aŭg. "	"	113-128
11-12	Nov.-Dec. "	"	81- 88	9(57)	15.de Sep. "	"	129-144
				10(58)	15.de Okt. "	"	145-160
1	Jan. 1892.	3.	1- 16	11(59)	15.de Nov. "	"	161-176
2	Feb. "	"	17- 32	12(60)	15.de Dec. "	"	177-192
3	Mar. "	"	33- 48				
4	Ap. "	"	49- 64	1(61)	15.de Jan. 1895.	6.	1- 16
5	Majo "	"	65- 80	2(62)	15.de Feb. "	"	17- 32
6	Junio "	"	81- 96	3(63)	15.de Mar. "	"	33- 48
7	Julio "	"	97-112	4(64)	15.de Ap. "	"	49- 64
8	Aŭg. "	"	113-128	5-6(65-66)	Majo-Junio "	"	65- 80
9	Sep. "	"	129-144				

Formato de la gazeto:

1889.-1891. 25,5 x 35 cm (ZH, 31),

1892.-1895. 13,5 x 22 cm (OV, 55).

El tiu ĉi listo ni vidas, ke en la 1-a jaro (1889.-1890.) eliris 12 numeroj, 60 p., en la 2-a jaro (1891.) - 12 numeroj, 88 p., en la 3-a jaro (1892.) - 12 numeroj, 194 p., en la kvara jaro (1893.) - 12 numeroj, 192 p., en la kvina jaro (1894.) - 12 numeroj, 192 p., en la 6-a jaro (1895.) - 6 numeroj, 80 p.; entute eliris 66 numeroj kun 806 paĝoj en Nürnberg, Germanujo. (EE 2, 318, 319; ZH, 49).



## RUSA URBO PAŜPREMIS NUR MUŜETON

Tiu fakto tre amarigis Tolstoj kaj li sentis sin responde pro la malpermeso. En letero de la 5-a de Majo 1895. al la verkisto Nikolaj Nikolajeviĉ Straĥov (la 28. de Oktobro 1828. - la 7. de Februaro 1896.) Tolstoj skribas: "Estas tia doktoro Zamenhof, kiu kreis Esperantan lingvon kaj publikigadis en ĝi gazeton, ŝajnas en Dresden. La gazeto havis ĉirkaŭ 600 abonantojn, el kiuj la plimulto estis en Rusujo. Miaj amikoj, precipe unu, Tregubov (8), granda apoganto de Esperanto, dezirante subteni la gazeton, publikigis tie unu mian leteron pri la rilato de racio al kredo, tre senkulpan, kaj ankaŭ unu artikolon pri la nepagado de impostoj en Nederlando (9). Tio kaŭzis, ke oni malpermesis enlasi la Esperanto-gazeton en Rusujon, kaj Zamenhof, pasie dediĉita al sia kreitaĵo kaj materie ruiniĝinta jam antaŭe pro tiu ĉi afero, suferis parte ankaŭ de mi. Ĉu ne estas eble havigi al li denove permeson por allaso de la gazeto en Rusujon? Mi promesas nenion presigi en lia gazeto kaj neniom partopreni". (LT, vol. 68, p. 89).

Straĥov parolis pri afero kun poeto Apollon Nikolajeviĉ Majkov (4, Junio 1821 - 20, Marto 1897), kiu tiam estis prezidanto de la komitato por eksterlanda cenzuro, kaj tiu promesis plenumi peton de Tolstoj. Straĥov informis Tolstojon pri sia interveno en letero de la 6-a de Junio 1895: "La aferon de Esperanto mi komisiis al Majkov. Li trovis ĝin ebla kaj forte promesis entrepreni". (LT, vol. 68, p. 90). La malpermeso estis nuligita, sed tio ne savis gazeton, kiu ĉesis aperi en Aŭgusto 1895 (E, 221). En letero de 9(21).5.1895. al J.Guminski Zamenhof skribas: "Mi klopodas nun, ke oni permesu al mi eldonadi la gazeton en Rusujo sub cenzuro". (OV, 497). Pri rezultato de lia klopodo ni nenion scias.

V.Gernet rakontas: "Kiam Trompeter rifuzis eldonadi la "Esperantiston", odesanoj decidis kolekti monon kaj daŭrigi ĝian aperon. Sed efektiviĝis, ke tiu entrepreno estas nebla en niaj kondiĉoj. La cara cenzuro ne donus permeson. Ni povis nur redakti la "Bibliotekon" kaj poste la "Lingvon Internacian". Eĉ Esperantan vortaron ni apenaŭ sukcesis eldoni. Zamenhof alsendis al ni manuskripton de la traduko de la Esperanto - germana Jürgensen-vortaro, sed la cenzuro konfiskis ĝin. Ni plendis al la Ĉefa Cenzur-Administrejo kaj ricevis la respondon: "Esperanto ne estas lingvo. Ĝi estas konspira rimedo por skribe esprimi siajn pensojn per simbolaj signoj. Ĝi similas al slango (ŝtelista lingvo)!"

Ni refutis tiun absurdafon. Almenaŭ ni postulis, ke oni redonu la manuskripton. Rifuzo. Ni tion ne lasis. Ree komenciĝis malagrabra interkorespondado. Dank'al ies protekto ni rericevis la manuskripton kun klarigo: "ke oni ne povas permesi ĝian presigon, ĉar forestas cenzuristoj, kiuj posedas la lingvon internacian. Ho, tio estis jam venko! Ni nin turnis al unu cenzuristo, kiu akceptis respondecon pri la eldonaĵo je si. Certe, li ne ellernis nian lingvon ("absurdaĵo estas ĝi"), sed almenaŭ donis la permeson. Kaj la vortaro finfine aperis. Jen kiom facile oni povis presi esperantaĵojn en la pasinta jarcento!"

Ankaŭ grandajn malfacilaĵojn ni devis venki, ricevante librojn kaj ĵurnalojn el eksterlando. Mi memoras unu lernolibron de la bulgara esperantisto Bogdanov. Sur ĝia ruĝa kovrilo estis presita diklitere vorto: Revolucio. La ricevo de tiaspeca libro estis sufiĉa por ke "oŝranka" (sekreta politika polico) ha-

vu "rajton" ekzili la ricevinton en Siberion. Kaj la ricevinto estis D-ro Zamenhof. Dum kelkaj semajnoj ni timis pri lia sorto, atendante lian areston." ("Kvardek jaroj", kolekto da originalaj verketoj, dediĉitaj al la 40-jara jubileo de ESPERANTO, eldonita de Sennacieca Asocio Tutmonda; p. 18, 19).

La regularo de la esperantista societo "Espero" en S. Peterburgo la 24-an de Marto (5. de Aprilo) de la 1892. estis konfirmita de la ministro de internaj aferoj. Laŭ § 2 de la Regularo por atingi celon societo b) aranĝas sistemajn kursojn de la lingvo "Esperanto", c) aranĝas publikajn parolojn pri la lingvo "Esperanto", e) eldonas gazetojn, librojn, broŝurojn k.t.p.

La privata esperantista rondeto en iu urbo por fariĝi filio de la "Espero" devis ricevi permeson de la guberniestro.

La privata rondeto de esperantistoj en Odessa la 6/18-an de Marto 1897. ricevis permeson fondi filion de la "Espero".

Al la Moskva esperantista rondeto la guberniestro en la komenco de la 1902. rifuzis rajton fondi filion de la "Espero".

La esperantista rondeto en Ĥabarovsk (Orienta Siberio) la 7.5. (20.5.) 1902. ricevis de la administracio oficialan permeson fondi filion de la "Espero".

K. Ostanieviĉ en S. Peterburgo post longaj klopodoj en la komenco de la 1903. ricevis de la registaro permeson fari kurson publikan de Esperanto.

V. Bogorodnikov en Vjatka (Urala regiono) post permeso de la estraro en la fino de la 1904. organizis kurson Esperantan.

En la komenco de Februaro 1910. "Ruslanda Ligo de Esperantistoj" ricevis de la registaro permeson kunvoki en S. Peterburgo dum la 20.-25. de Aprilo (3.-8. de Majo) 1910. kunvenon de ruslandaj esperantistoj; de la registaro estis konfirmita programo de ĝia laboro.

Ĉia Esperanta gazeto de la 1887. ĝis la 1904. estis malpermesata en Ruslando, naskolando de Esperanto. Dank' al grandaj klopodoj kaj oferemo I. Ostrovskij la 6. (19.)-an de Junio 1904. ricevis de la registaro permeson eldonadi duonmonatan rusa-Esperantan gazeton "Esperanto". En "Pravitelstvennij Vjestnik" (Registara Revuo) la 6./19-an de Junio 1904. estis presite jena oficiala sciigo:

"La 11-an de majo 1904. (malnova stilo) al Ilja Davidoviĉ Ostrovskij estas permesita la eldonado en S. Peterburgo, kun permesado de la antaŭelira cenzuro, sub lia redaktado, de dusemajna ĵurnalo sub nomo "Esperanto" laŭ jena programo: a) Gvidaj artikoloj, celantaj konatigi la rusan publikon kun la nuna stato de la demando pri la enkonduko de internacia, helpa, artefarita lingvo, kiu, tute ne atencante je ekzistado de vivaj lingvoj, devas servadi por faciligo de sciencaj, literaturaj kaj komercaj interkomunikoj inter homoj, parolantaj en diversaj lingvoj; konatigi la publikon aparte kun la sistemo de la internacia lingvo "Esperanto", atinginta vastan konatecon kaj praktikan uzadon en eksterlando. Demandoj kaj sciigoj de politika, politekonomia kaj religia karaktero tute ne estos lokataj en la ĵurnalo. - b) Modeloj de originalaj kaj tradukitaj artikoloj sciencaj, literaturaj, teknikaj kaj komercaj, akompanataj per paralela laŭvorta rusa traduko. - c) Sciigoj pri disvolvado de la ideo de internacia lingvo kaj ĝiaj uzoj en Rusujo kaj aliaj regnoj. - d) Anoncoj en la internacia kaj rusa lingvoj. - Tempo de elirado estas: 2 fojoj ĉiumonate. Abona kosto por la jaro: tri rubloj."

Loko de ĝia eldonado estas Peterburgo; la redaktoro D-ro I. D. Ostrovskij

estas en Jalta (gubernio de Taŭrido). N-ro 1-2 de la gazeto Esperanto aperis en Januaro 1905. kaj numeroj 3-4 kaj 5-6, kiuj estis la lastaj, en Februaro 1905. Entute aperis 3 numeroj. Ĉiu numero enhavis 24 p.

En la Lingvo Internacia, n-ro 11 (119), 1. de Junio 1905., p. 263, I.Ostrovski publikigis sekvantan alvokon:

"Al abonantoj kaj legantoj de la rus-Esp. gazeto "Esperanto".

La presado kaj eldonado de nia ĵurnalo renkontas neforigeblajn malfacilaĵojn kaj malhelpojn, tial mi estas devigata transporti la tutan aferon el Peterburgo malproksimigata de ni per dumilversta interspaco, en urbon Jalta, kie mi persone povos zorgi pri siatempa apero de la ĵurnalo. Por tiu ĉi celo mi komencis novajn klopodojn ĉe la registaro pri la bezona permeso, pri loka cenzurado, pri nova Esperanta literaro k.t.p. Ĉio tio ĉi, kompreneble, postulos tempon, kiun mi ne povas nun difini precize.

Al mia neesprimebla bedaŭro mi estas devigata tempe interrompi la eliradon de nia ĵurnalo. Mi petas pardoni tiun ĉi kontraŭvolan halton.

Mi uzos miajn ĉieleblajn penadojn plirapidigi la aferon por pli baldaŭa re-apero de nia ĵurnalo kaj mi esperas, ke, post la devigita tempa halto, ĝi jam senmalhelpo elirados regule el Jalta.

Redaktoro-eldonisto de "Esperanto":  
Doktoro I. Ostrovski

La societo "Espero", ricevinte permeson, eldonadis novan gazeton de Aprilo 1905. ĝis Marto 1908. sub titolo "Ruslanda Esperantisto". Redaktis I.Asnes.

De la 1895. ĝis la 1905. en Rusujo aperis: A.Puŝkin. Ŝtona gasto en traduko de N. Borovko. Odessa 1895., 30 p.; L. Zamenhof. Kratkija svedenija o meĵdunarodnom jazike (Mallongaj sciigoj pri internacia lingvo). Varŝava 1895., 23 p.; L.Zamenhof. Meĵdunarodnij jazik Esperanto (Internacia lingvo Esperanto). Varŝava 1895., VI+84 p.; V. Korolenko. Fantomoj en traduko de Gernet. Odessa 1896., 49 p.; L.Zamenhof. Adresaro de novaj esperantistoj serio XVI, 1896., 47 p.; L. Samenhof. Wahl einer internationalen Sprache (Elektio de internacia lingvo). S. Peterburg, 1897., 11 p.; H. Stahlberg. Lernolibro de la lingvo Esperanto. Tallinnas, 1899., 64 p.; Hanez. Lernolibro de la lingvo internacia "Esperanto" por israelidoj. Varsovio, 1900., 64 p.; J. A. Rahamägi. Lernolibro de la lingvo Esperanto por estonoj. Tallinnas, 1903., 48 p.; L.Zamenhof. Język międzynarodowy Esperanto. (Internacia lingvo Esperanto). Warszawa 1904., 100 p.; A.Laurén kaj K.Kuntzi. La internacia helplingvo de d-ro L. Zamenhof. Jyväskylä, 1904., 72 p. Krom tio ripetitaj eldonoj de verkoj jam antaŭe publikigitaj kaj de la cenzuro permesitaj (KD, 33, 109; EE 2, 589; FE, 348).

En 66 Zamenhof - poŝtkartoj, senditaj al René Lemaire, ni legas: de la 17.(30.)4.1901.: "Mi nun preparas novan eldonon de la verko N-ro 64, sed pli frue ol en Junio la verko ne povos aperi dank' al la cenzuro"; de la 15.(28.)5.1901.: "Cenzuro faras al mi grandajn malfacilaĵojn kun la libroj, venantaj el eksterlando"; de la 29.5.(11.6.)1901.: "N-ron 46 mi jam ne havas (kun tiu ĉi verko la cenzuro faras al mi gravajn malfacilaĵojn kaj tial mi jam ne povas venigadi ĝin)". Zamenhof registradis aperantajn esperantajn librojn, al ĉiu libro li donadis ordan numeron kaj enskribadis en "Nomaron de la verkoj pri la

lingvo internacia Esperanto". Sub n-ro 64 ni trovas: "L.Zamenhof, Universala vortaro de la lingvo Esperanto. 1894., 52 p." Sub n-ro 46 estas enskribita libro: "V.V. de Majnov. Renaskita Manfred, dramo en tri aktoj de K.R. (en Esperanto). 1891., 18 p." K.R. - granda princo Konstantin Konstantinoviĉ Romanov, fama rusa poeto kaj prezidanto de la Rusa Akademio de Sciencoj en S.Peterburgo (PH, 47; OV, 475).

Tiuj konstantaj malhelpoj de la kaprica kaj stulta cenzuro daŭre muelis nervojn de Zamenhof. Prokrastoj, stultaĵoj estis neeviteblaj en tia kontraŭkultura sistemo, eĉ kiam individuaj cenzuristoj estis modere inteligentaj kaj liberalaj.

La cenzuro etendadis siajn longajn fingrojn en ĉiujn direktojn. S-ino A. Prokhoroviĉ en la "Esperantisto", n-ro 10, 1894., 147, proponis, ke ĉiuj esperantistoj portu malgrandan kvinpintan stelon (2 1/2 cm en diametro) el origita bronzo aŭ aluminio kun la surskribo "Esperanto" kiel simbolon de la Esperanta movado, sed laŭ la "Esperantisto", n-ro 1, 1895., 8, estis malpermesite porti tiujn signojn en Rusujo.

Kviete, brile ridas  
la bela verda stel',  
do kien ĝi nin gvidas,  
al kia alta cel'?

La bela steloflamo  
alflustras nin kun flat':  
ni petas vin pri amo,  
la fratojn amu, frat'!

K. Kalocsay (NP, 214)

Pro kio estas nia verda stelo  
la signo por la lingvo de l'espero?  
Per la kvin pintoj kun simbola celo  
ĝi montru la kvin partojn de la tero.

Ke ilin en konkorda harmonio  
kunigu de l'ideo la konscio,  
al kio ni servadas kun fervoro,  
tion sopiras ni kun arda koro.  
Kaj la koloro de la stelo diras,  
ke ni esperas, kiel ni sopiras.

K. Vanselow (VE, 103; NLE, 64)

Nullus propheta in patria. (Traduko: Neniu estas profeto en (sia) patrujo). Evangelistoj diras: "Profeto ne estas sen honoro, krom en sia patrujo kaj en sia domo" (Sankta Mateo 13, 57); "Profeto ne estas sen honoro, krom en sia patrujo kaj inter siaj parencoj kaj en sia domo" (Sankta Marko 6, 4); "Neniu profeto estas akceptata en sia patrujo" (Sankta Luko 4, 24); "Profeto ne havas honoron en sia propra lando" (Sankta Johano 4, 44) kaj Zamenhof tiujn ĉi sentencojn eldiras per "Neniu estas profeto en sia urbeto".

Zamenhof estis modesta sindetena homo, sed la cenzuraj malhelpoj kaj baroj sur ĉiu paŝo elpuŝis eĉ lin el ekvilibro. En la letero de la 25-a de Aprilo 1904. al Bourlet Zamenhof skribas: "Se Hachette sendos al mi la Adresarojn en la mezo de Majo, tiam mi - dank'al nia malbenita cenzuro ricevos ilin ne pli frue ol en la fino de Junio." (LZ 1, 71).

\* \* \*

Tie ĉi mi esprimas mian profundan dankon al la kunhelpantoj verki tiun ĉi artikolon:

al la esperantistoj:

inĝ. F. Gorizdro, Taŝkent, Sovetujo,

R. Jossinet, Paris, Francujo,

J. Leslie, London, Britujo,

al la Muzeo-bieneto de L. Tolstoj "Jasnaja Poljana", Tula dist., Sovetujo.

prof. B. Toll, Leningrad, Sovetujo,

A. Koň, Lvov, Sovetujo,

M. C. Butler, London, Britujo,

R. Mackay, Edinburgh, Britujo,

CENZURAJ DATOJ

21. de Majo (2. de Junio) 1887. Unua Esperanto-libro en la rusa lingvo; 2-a eld. 31. de Dec. 1887. (12. de Jan. 1888.); 3-a eld. 31. de Julio (12. de Aŭgusto) 1889.  
En la pola lingvo Esperanto-libro  
En la franca lingvo Esperanto-libro  
En la germana lingvo Esperanto-libro
9. (21.) de Julio 1887.  
12. (24.) de Septembro 1887.  
21. de Oktobro (2. de Novembro) 1887. En la germana lingvo Esperanto-libro  
31. de Decembro 1887. (12. de Januaro 1888.) 2-a eld. de la unua Esperanto-libro
12. (24.) de Januaro 1888. J. St. En la angla lingvo Esperanto-libro  
18. (30.) de Januaro 1888. Dua libro; 2-a eld. 2. (14.) de Decembro 1892.  
6. (18.) de Junio 1888. Aldono al la Dua libro; 2-a eld. 9. (21.) de Januaro 1889.
13. (25.) de Oktobro 1888. Puŝkin. La neĝa blovado  
1. (13.) de Decembro 1888. N. N. Dua libro en la rusa lingvo  
28. de Decembro 1888. (9. de Januaro 1889.) Plena vortaro rusa-internacia; 2-a eld. 7. (19.) de Septembro 1895.; 3-a eld. 6. (18.) de Majo 1899.  
5. (17.) de Januaro 1889. Geoghegan. En la angla lingvo Esperanto-libro  
9. (21.) de Januaro 1889. 2-a eld. de Aldono al la Dua libro  
9. (21.) de Januaro 1889. N. N. Aldono al la Dua libro en la rusa lingvo  
30. de Januaro (11. de Februaro) 1889. Goethe. La gefratoj  
30. de Januaro (11. de Februaro) 1889. Vortaro Internacia-germana  
20. de Marto (1. de Aprilo) 1889. Libeks. En la latva lingvo Esperanto-libro  
31. de Julio (12. de Aŭgusto) 1889. Tria eld. de Unua Esperanto-libro  
13. (25.) de Aŭgusto 1889. Lermontov. Princino Mary  
18. (30.) de Septembro 1889. 1-a Adresaro de esperantistoj  
1. (13.) de Marto 1890. David Gurevič. Hebrea mallonga vortaro kun lernolibro de la internacia lingvo  
29. de Aprilo (11. de Majo) 1892. Regularo de la societo "Espero"  
2. (14.) de Decembro 1892. 2-a eld. de la Dua libro  
8. (20.) de Decembro 1892. Beaufront. Langue internationale Esperanto.  
30. de Junio (12. de Julio) 1893. Universala vortaro; 2-a eld. 24. de Februaro (8. de Marto) 1898.; 3-a eld. 3. (15.) de Majo 1899.; 4-a eld. 17. (30.) de Aprilo 1901.; 5-a eld. 12. (25.) de Junio 1904.
29. de Julio (10. de Aŭgusto) 1893. Ekzercaro; 2-a eld. 24. de Julio (5. de Aŭgusto) 1897.; 3-a eld. 3. (15.) de Majo 1899.; 4-a eld. 12. (25.) de Junio 1904.  
5. (17.) de Oktobro 1893. Granda germana-Esperanta vortaro  
5. (17.) de Oktobro 1893. Lermontov. Demono  
8. (20.) de Decembro 1894. Puŝkin. Ŝtona gasto  
8. (20.) de Decembro 1894. Meĵdunarodnij jazik "Esperanto". Polnij učebnik  
10. (22.) de Januaro 1895. Korolenko. Fantomoj  
21. de Marto (2. de Aprilo) 1895. Traduko de la Ekzercaro en la franca lingvo; 2-a eld. 3. (15.) de Majo 1899.  
7. (19.) de Septembro 1895. 2-a eld. de Plena vortaro  
18. (30.) de Oktobro 1895. Beaufront. Petite brochure. Varsovie  
31. de Oktobro (12. de Novembro) 1895. 16-a Adresaro de esperantistoj

15. (27.) de Novembro 1895.	2-a eld. de Regularo de la societo "Espero"
14. (26.) de Decembro 1895.	Waśniewski. O Języku międzynarodowym Esperanto
7. (19.) de Februaro 1897.	Vibor meĝdunarodnago jazika
2. (14.) de Marto 1897.	L. Samenhof. Wahl einer internationalen Sprache
2. (14.) de Marto 1897.	Choix d'une langue internationale
24. de Julio (5. de Aŭgusto) 1897.	2-a eld. de Ekzercaro
24. de Februaro (8. de Marto) 1898.	2-a eld. de Universala vortaro
3. (15.) de Majo 1899.	3-a eld. de Universala vortaro
3. (15.) de Majo 1899.	3-a eld. de Ekzercaro
3. (15.) de Majo 1899.	2-a eld. de traduko de Ekzercaro en la franca lingvo
6. (18.) de Majo 1899.	3-a eld. de Plena vortaro
29. de Januaro (11. de Februaro) 1901.	Gomo sum. Gillelizm
17. (30.) de Aprilo 1901.	4-a eld. de Universala vortaro
12. (25.) de Junio 1904.	5-a eld. de Universala vortaro
12. (25.) de Junio 1904.	4-a eld. de Ekzercaro
15. (28.) de Novembro 1905.	N.N. Devjatnin. Plena verkaro. Libro dua.

#### PIEDNOTOJ.

- (1) J.M. Schleyer. Volapük, die Weltsprache. Entwurf einer Universalsprache aller Gebildeten der ganzen Erde. Sigmaringen, 1880. (Traduko: J.M. Šlajer. Volapük, la mondlingvo. Projekto de unu universala lingvo de ĉiuj kle-raj homoj de la tuta mondo. Sigmaringen, 1880) (DH, 101).
- (2) Vladimir Vladimiroviĉ Majnov (nask. 1871.) estis filo de geografo kaj literaturisto Vladimir Nikolajeviĉ Majnov; esperantisto (en la unua Adresaro de esperantistoj, publikigita en Januaro 1890., li estas enskribita sub n-ro 579), tradukisto en Esperanton; literaturisto, kunlaboranto de rusaj, francaj kaj usonaj gazetoj. En la unua Adresaro de esperantistoj lia adreso estas: S. Peterburg, Troickaja ul. dom Nr 3, kvart. 39; en la "Esperantisto", n-ro 6, Junio 1892., p. 96, Majnov donas sian adreson: "Vladimir Vladimiroviĉ de Majnov, S. Peterburg, Bureau des Postes, poste restante"; letero de la 11. (23.) 8. 1893. de Zamenhof al Majnov estis adresita: Voroneĝ (OV, 488); en la "Esperantisto", n-ro 9(45), la 15-a de Septembro 1893., p. 130, ni trovas: Vlad. Vlad. Majnov, Voronesch, postrestante; en la XIX-a Adresaro de esperantistoj (1./13. de Januaro 1899.), p. 16, lia ŝanĝita adreso estas: Vladimir Vladimirovitch de Maynov, St. Petersburg, Russie, 7 ligne de l'Isle de Basile, maison Nr. 2, logement Nr. 24; en la XXI-a Adresaro de esperantistoj (la 1./14. de Januaro 1900. ĝis la 1./14. de Januaro 1901.), p. 24, lia ŝanĝita adreso estas: V. Maynov, Scranton, Pennsylvania, Unuigitaj Ŝtatoj Nord-Amerikaj. - Bureau des postes, poste restante; en la XXV-a Adresaro de esperantistoj (la 1. de Januaro 1904. ĝis la 1. de Januaro 1905.), p. 34, lia ŝanĝita adreso estas: Vladimir Vladimiroviĉ de Maynov, S. Peterburg, Mogilevskaja ul., d. 23, kv. 18; en la XXVI-a Adresaro de esperantistoj (la 1. de Januaro 1905. ĝis la 1. de Januaro 1906.), p. 34, lia ŝanĝita adreso estas: Vladimir Vladimiroviĉ de Maynov. St. Peterburg, Drovĵanoj per. 9, kv. 1.
- (3) Pri pogromoj legu mian artikolon en n-ro 217, aprilo 1963., de la "Franca

- Esperantisto" kaj la libron "A. Holzhaus. Doktoro kaj lingvo Esperanto", 1969.
- (4) En la letero de la 21-a de Februaro 1905. al A. Michaux Zamenhof skribas: "La Varsovia universitato mi finis en la komenco de januaro 1885." (LZ 1, 112). El lia diplomo ni vidas, ke li finis universitaton la 5-an (la 17-an laŭ la nova kalendarstilo) de Februaro 1885.
- (5) Baptonomon de Tolstoj Sinodo ne kapablis nomi.
- (6) Anna Hermanovna - Ano, filino de Hermano.
- (7) En Evangelio laŭ Sankta Mateo 11, 25 ni legas: "Vi tion kaŝis for de saĝuloj kaj prudentuloj, kaj malkaŝis al infanoj". En Evangelio laŭ Sankta Luko 10, 21 ni legas: "Vi kaŝis ĉi tion for de saĝuloj kaj prudentuloj, kaj malkaŝis al infanetoj".
- (8) Ivan Mihajloviĉ Tregubov (1858-1931) estis kunlaboranto de "Posrednik" kaj esperantisto. En la 1897. pro la partopreno en helpo al spiritbatalantoj li estis ekzilita el Moskvo en Goldingen, Kurlanda gubernio. (EN, 8(56), 15.8.1894., 115). En la Adresaro de esperantistoj, serio XVI (la 1. de Oktobro 1893. - la 1. de Oktobro 1895.) sub n-ro 3332 estas enskribita Ivan Miĥajloviĉ Tregubov, Moskva, Dolgij pereulok, dom Njunina.
- (9) Per registrita letero de la 8-a de Oktobro 1963. la Muzeo-bieneto de L. Tolstoj "Jasnaja Poljana" informis min, "ke la artikolo "Pri nepagado de impostoj en Nederlando" en la verkaro de Tolstoj ne ekzistas".
- En la n-ro 2, 1895., de la "Esperantisto" sur la p. 31 estas presita mallonga informo: "Holandujo. En Amsterdamo fondiĝis ligo, kies partianoj rifuzas la pagadon de regnaj depagoj. En tiaj okazoj la registaro faras devigan disvendo de la havo; sed la membroj de la ligo trovis rimedon kontraŭ tio ĉi: en la tago de la publika disvendo ili kolektiĝas amase en la loĝejo, kie devas havi lokon la disvendo, kaj tute forigas la eblecon de alveno de aĉetantoj. Tiu ĉi manovro devigis la estraron por kelka tempo rifuziĝi de la publikaj vendoj, kaj la Holanda registaro nun estas okupita je la demando, per kio oni povus ilin anstataŭigi". Subskribis B.

#### FONTINDIKOJ.

- 1 BG - Bratja Granat. Enciklopediĉeskij slovarj. 1901., 9-a vol.
- 2 BH - K. Brüggemann. Historio de Esperanto. 1923., 160 p.
- 3 BJ - Brokgauz i Jefron. Enciklopediĉeskij slovarj. 1903., 37-a vol.
- 4 BS - Bolŝaja sovsetskaja enciklopedija. Dua eldono. 46-a vol.
- 5 DH - E. Drezen. Historio de la mondlingvo. 1931., 243 p.
- 6 E - "Esperanto". N-ro 649. Decembro 1959., 201-224 p.
- 7 EE1 - L. Kökény kaj V. Bleier. Enciklopedio de Esperanto. 1933., 1934., 272 p.
- 8 EE2 - L. Kökény kaj V. Bleier. Enciklopedio de Esperanto. 1934., 1935., 273-600p.
- 9 EN - "Esperantisto" n-ro
- 10FE - L.L. Zamenhof. Fundamento de Esperanto. 1963., 356 p.
- 11FK - L.L. Zamenhof. Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto. 1939., 463p.
- 12 IL - Dr. Esperanto. Meĵdunarodnij jazik. Predislovije i polnij učebnik. 1887., 40 p.
- 13KD - Katalogo de la biblioteko (1887.-1911.) de Georg Davidov en Saratov. 1911., 129 p.
- 14LM - "Literatura Mondo". Junio 1931., p. 101-128.
- 15LT - Lev Tolstoj. Polnoje sobranije soĉinenij. 90 volumoj.

- 16LZ1 - G. Waringhien. Leteroj de L.L.Zamenhof. Unua volumo. 1948., 367 p.  
 17ML - Meyers Lexikon. 9-a vol. 1928., 831 p.  
 18NB - "Nuntempa Bulgario". N-ro 12. 1958., 29 p.  
 19NLE - Karl Vanselow. Nia lingvo Esperanto. - 192 p.  
 20NP - "Norda Prismo". N-ro 4. 1958., 40 p.  
 21NR - "La nica literatura revuo". 40 p.  
 22OL - V. Bleier kaj E. Cense. Ora libro de la Esperanto-movado 1887.-1937., 224 p.  
 23OV - J. Dietterle. Originala verkaro de L.L.Zamenhof. 1929., 606 p.  
 24PH - E. Privat. Historio de la lingvo Esperanto. (1887.-1900.). 1923, 74 p.  
 25PV - E. Privat. Vivo de Zamenhof. 1946., 133 p.  
 26PZ - Petskribo de L.Zamenhof. 1888., 19 p.  
 27SAT - "Sennacieca Asocio Tutmonda". Kvardek jaroj. 1927., 48 p.  
 28SR - "Sennacieca revuo". N-ro 86. 1958., 56 p.  
 29VE - Karl Vanselow. Esperanto. 1948., 124 p.  
 30ZH - A. Zakrzewski. Historio de Esperanto. (1887.-1912.). 1913., 144 p.

### INDEKSO DE NOMOJ

(Numeroj en krampoj estas prenitaj el 29 Adresaroj de esperantistoj)

Adiĥajevskij	188	Einstein Leopold (205)	188,189
Aleksandro la Dua	178,193	Feoktistov E.	188
Aleksandro la Unua	177	Florell Arthur (230)	181
Asnes I.	203	Frenkel J.	182
Beaufront Louis (46, 1028)	205	Gejpspitz E.	180
Bergeman	181	Geoghegan Richard H. (264)	198,205
Bitner V.V.	198	Gernet Vladimir Aleksandroviĉ (3794)	201,203
Bleier Vilmos	207	Goethe Johan Wolfgang	205
Bogdanov Miloslav (1049)	201	Gorizdro Feoktist Nikolajeviĉ	195,204
Bogorodnikov V.	202	Granat	207
Borovko Nikolaj Afrikanoviĉ (1058)	203	Gresser	181
Boulton Marjorie	192	Griniewecki Ignatij	188
Bourlet Carlo (6484)	204	Guminski J. (1150)	198,201
Brodovskij Vl.	187	Gureviĉ David	205
Brokgauz	207	Hachette	204
Brüggemann K.	207	Halle Nikolaj	181
Butler Montagu Christie (13865)	204	Haller Eduard Karloviĉ (331)	181
Cense Eugénie Françoise	208	Jefron	207
Collins	181	Jekaterino la Dua	177
Ĉertkov V.G.	189	Jossinet Roland	204
Davidov Georgij Karpoviĉ (4337)	207	Jürgensen Hermann	201
Delanov	183	Kalocsay Kolomano	204
Devjatnin Vasilij Nikolajeviĉ (1701)	180,	Kanaloŝÿ-Leffler Ferdinand (414)	181
Dietterle Joh.	206	Karamzin Nikolaj Miĥajloviĉ	177
Drezen Ernest K.	192,208		
	207		



Kelter Christian	179	Radišček Aleksandr Nikolajevič	177
Klohk	181	Romanov K.K.	204
Koň Anatolo	195,204	Rozen Anna Hermanovna	195,196,198
K.R. (Konstantin Konstantinovič Romanov)	204		207
Kökény Lajos	207	Sankta Johano	204
Korolenko Vladimir Galaktionovič	203,205	Sankta Luko	204,207
Kravcov Vasilij Lvovič (1238)	191	Sankta Marko	204
Krilov Ivan Andrejevič	177	Sankta Mateo	204,207
Lagodovski A.	178,180,183	Sazonov E.S.	183
Lavrovskij N.	187	Schleyer (=Šlejer) Johann Martin	185,206
Leffler	181	Schmidt Christian (801)	188
Leibniz Gottfried Wilhelm	185	Sokolov Naŝum	182
Lemaire René (2026)	203	Steinhaus Julian (=J. St.) (883)	179,180,205
Lermontov Miĥail Jurjevič	180,205,206	Stojan Petro E. (9864)	199
Leslie J.	204	Straŝov Nikolaj Nikolajevič	201
Libeks Rudolf	205	Širjajev Ivan Genadijevič (3228)	193
Lilienblum Mozes Lejb	182	Terentjev V.M. (909)	181
Mackay Robert	204	Toll Boris	204
Majakovskij Vladimir Vladimirovič	178	Tolstoj Lev Nikolajevič	189,193,195,198,201,204,207
Majkov Apollon Nikolajevič	201	Tregubov Ivan Miĥajlovič (3332)	201,207
Majnov Vladimir Vladimirovič (579)	179,180,181,182,188,189,191,198,204,206	Trompeter Wilhelm Heinrich (918)	189,199,201,204,208
Martinovski Emil (1678)	181	Vanselow Karl	204,208
Michaux Alfred (6305,6981)	207	Viŝrovskij Josif	187
Nevskij I.	187	Viŝrovskij Julian	187
Nikolao la Dua	178	Vjazemskij Pjotr Andrejevič	177
Nikolao la Unua	178	Wahl Edgar (932)	181
Ostanievič Kazimir Osipovič	202	Waringhien Gaston	208
Ostrovskij Ilja Davidovič (1869)	202,203	Waŝniewski Jósef	206
Paŭlo la Unua	177	Zakrzewski Adam (10934)	195,199,208
Pleve Vjačeslav Konstantinovič	183,188	Zamenhof Klara	188
Privat Edmond (8078)	181,195,208	Zamenhof Marko	179,182,183,187
Proŝorovič-Kočmarenko Aleksandra Vasiljevna (1599)	204	Zilbernik Aleksandro	179,183
Puŝkin Aleksandr Sergejevič	177,203,205	Zusmen Nikolaj Vasiljevič	182,183

EL LA REDAKCIO: Ni jam aperigis similan artikolon "Cara cenzuro kaj Esperanto" de S.K. Ĥvorostin (ĉ. Vol. 23, n-roj 1/2 kaj 3), sed ni publikigas ankaŭ ĉi tiun artikolon, ĉar ĝi estas iom pli kompleta.